

revuo

esperanto

junio 1967

60-a jaro

n-ro 739 (6)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)



ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 85 Lerneĵaj komparoj (V.S.)
- 86 Enkonduko en la libroskiencon de Esperanto (Haupenthal)
- 89 Memorsolenaĵoj pri Julio Baghy
La 19-a IFEF-Kongreso en Fulda
- 90 Petr Bezruč — poeto de patosa spito
- 91 Subtilaj danĝeroj (Feldman González)
- 92 La lingvoj de la hebreoj (Ginz)
- 93 Leteroj
- 94 Lerneja bulteno n-ro 10:
La Asociaĵintaj Lernejoj de Unesko
- 96 Recenzoj
- 98 Ricevitaj eldonaĵoj
52a Universala Kongreso, Tel Aviv, 1967
Aervojaĝo de UEA al Israelo
- 99 Mallonge
- 100 Nekrologoj Baaten, Klein, Goemans, Pawlik,
- 101 Deŝkin
- 102 La Juna Vivo
Esperanto en radio
Internacia Ekzamena Komisiono
Ciferoj por meditado
Oficiala informilo n-ro 402
- 103 La internaciaj konkursoj 1967
- 104 Anoncetoj

kovrila bildo

La centra parto de urbo Opava, Ĉeĥoslovakujo (foto: Silezia Muzeo/Arnošt Pustka). En Opava, naskiĝurbo de Petr Bezruč (vidu p. 90) okazos de la 7-a ĝis la 10-a de julio Kultura Esperanta Festivalo (februaro, p. 29).

bildojn liveris

- 90 Silezia Muzeo/Josef Solnický
- 92 Dov Barnea

esperanto
majo 1967

oficiala organo
de universala
esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1967): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,45 gld. aŭ 1 int. respondkuponon por ĉiu duobla vorto.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en ĉ. 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: (01) 904 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

LERNEJAJ KOMPAROJ

Pasis pli ol du jaroj, de kiam "Esperanto" lastfoje superrigardis la mondan situacion de la instruado de la Internacia Lingvo en lernejoj (1965, marto, p.41). Ĉi-jare aperas bildo kunmetita el novaj esperigaj progresoj, kun, aliflanke, kelkaj malprogresoj. Grava malfacilaĵo ĉe la analizo de enketo kiel tiu pri lernejoj estas, ke foje ne eblas decidi, ĉu ŝanĝitaj ciferoj spegulas realajn progresojn aŭ malprogresojn, aŭ ĉu la informoj estas nur pli aŭ malpli kompletaj, ol antaŭe. Por tiu ĉi superrigardo ni tial uzis kompletigitan sliparon de CED pri la periodo 1965-1966 kaj krome ĉiujn aliajn troveblajn fontojn de informoj.

Por komenci de la maldolĉa flanko: certe degeneris la situacio en Jugoslavio. Restas la permeso instrui la lingvon nedevige en kiu ajn lernejo ekster la kadro de la regula instrutempo, sed la financado de lernejoj transiris de la respublikaj al la komunumaj buĝetoj kun la rezulto, ke ĉesis la antaŭaj subvencioj por instruado de Esperanto, preparado de instruistoj kaj aplikado (ekz. Grajnoj en Vento). Ĉesis interalie la instruado en la Universitato de Zagreb.

En Pollando la instruado okazas same eksterkadre (en "rondoj de interesiĝoj"), laŭ la leĝo de 1956. Ekzistas oficialaj diplomoj por instruistoj, unuopaj kadraj, eĉ devigaj kursoj laŭ aparta ministeria permeso, kaj pluraj kursoj en universitatoj k.s. Malgraŭ tiuj kondiĉoj, la nombroj de lernejoj kaj lernantoj signife malkreskis (laŭ la informoj, de 77 lernejoj en 1962-3 ĝis 57 en 1965-6). Simila malkresko aperas en Francujo, kie la rajtigon donas ne ŝtataj, sed regionaj instancoj.

Antaŭ kelkaj jaroj Jugoslavio sola havis pli ol la duono de la monda sumo de lernejoj instruantaj Esperanton. Hodiaŭ ankoraŭ superregas orienta Eŭropo, sed nun la unuajn lokojn okupas Bulgarujo kaj Hungarujo, kio, cetere, nur reflektas la fortecon de la movado ĝenerale. Ambaŭ landoj montras grandajn progresojn de post la enketo de 1962-3. En Bulgarujo la progresojn kondiĉis ministra rajtigo de 1963. Hodiaŭ instruas 85 lernejoj de plej diversaj gradoj kaj tipoj, nedevige, interalie la Universitato de Sofio. Distriktaĵaj popolklerigaj komitatoj oficiale diplomas la instruistojn. Laŭraporte, en Hungarujo ĉ. 80 lernejoj instruas al ĉ. 1600 lernantoj, jen en, jen ekster la kadro de la regulaj lecionoj. La kursoj estas nedevigaj, sed povas konduki al abiturienta ekzameno. Pagas la instruadon ne la ŝtato, sed la lernantoj. De post oktobro 1966 preparas instruistojn ne plu Hungara Esperanto-Asocio, sed la universitatoj kaj pedagogiaj seminarioj. Tiu lasta fakto, la ministeria cirkulero de 1963 (pli grava, ol la samjara bulgara) kaj laste la eldono de speciala lernolibro por lernejoj en 40 000 ekz. - ĉio ŝajne aŭguras, ke baldaŭ Hungarujo estos la unua lando de la mondo tiurilate.

Aŭguras bone ankaŭ la fondo de lektorato en la filozofia fakultato de la Universitato Komenský, Bratislava, Ĉeĥoslovakujo, en oktobro 1966. En Ĉeĥoslovakujo la Esperanto-Komitato estas konsila organo de la instru-ministrejo, kaj pluraj lernejoj ekinstruis eksterkadre.

Alispecajn progresojn prezentas la anglalingvaj landoj, kie plejofte sufiĉas loka decido eĉ por deviga instruado. En tia situacio la kvanta kresko en Britujo (nun 32 lernejoj), Usono (19) kaj Nov-Zelando (kredeble 20-30) ŝuldiĝas al la klopodoj de la instruistoj mem kaj al kapablaj organizantoj. Precipe la britaj kaj usonaj instruistoj faras pioniran laboron sur la kampo de Esperanto-kursoj en elementaj lernejoj. En 1966 lernantoj en Britujo unuafoje ricevis ŝtate rekonitajn diplomojn (CSE) pri Esperanto. Usonajn instruistojn preparas de post 1964 kurso de la Universitato de Kalifornio. Inter pluraj devigaj kursoj en Nov-Zelando troviĝas la sendube plej granda de la mondo kun (en 1965) 620 lernantoj 10 ĝis 13-jaraj.

Grandaj esperoj ligiĝas nuntempe al la leĝprojekto en Italujo, nun sub konsidero, kiu donus al Esperanto pozicion egalan al tiu de aliaj fremdaj lingvoj. Nuntempe necesas loka kaj regiona permeso eĉ por eksterkadroj kursoj sen salajro. La simila, sed pli limigita leĝo de 1964 en Nederlando jam komencis doni fruktojn. Unuafoje en 1965 Esperanto-instruistoj povis akiri ŝtatan diplomon. Grava bato, aliflanke, estis la morto de docento Pragano, por kiu ĝis nun ne aperis anstataŭanto en la Universitato de Amsterdam.

Leĝprojekton pri deviga instruado en Argentino dufoje abortigis revolucioj. Laste, la revolucio de junio 1966 dissolvis la parlamenton. En Brazilo la leĝoj de 1962-4 pri mezgradaĵaj lernejoj kreis favoran situacion, sed la informoj pri la efektiva stato estas nekompletaj.

Pri la stato en Ĉinujo tute mankas aktualaj informoj. Kredeble ankoraŭ daŭras iuj el la 10 universitataj kursoj komencitaj en 1962-4, ĉar tion necesigus la kreskanta registara uzo de la lingvo. La programprojekto de la Japana Socialista Partio kontrastas kun la nuntempa situacio de nur sporadaj eksterkadroj kursoj en tiu lando. Instruado en Vjetnamujo estis ĝis nun tasko de la Esperanto-Asocio, sed nova kurso en pedagogia universitato eble signas ekpenetron en lernejojn.

Pro la necesa koncizo ne eblas ĉi tie aludi ĉiujn landojn, sed la supra trarigardo ampleksas la ĉefajn. Malgraŭ la grandaj malfacilaĵoj de enketado la ĝenerala bildo ne estas malkuraĝiga. Oni povas taksii, ke en la periodo 1965-1966 instruis ĉ. 500 lernejoj al minimume 17 000 lernantoj, kaj la nuna perspektivo esperigas pri plua kresko en la tuj venontaj jaroj.

V.S.

ĉefartikolo

esperanto
junio 1967

Reinhard Haupenthal, la 22-jara ĉefdelegito de UEA por Germanujo, jam akiris, malgraŭ sia juneco, rimarkindan reputacion kiel esperantologo kaj zamenhofologo. Lia ĉi-monata kontribuaĵo estas la unua el serio, kiu formas konservindan gvidilon por ĉiuj, kiuj deziras plivastigi sian scion pri la Esperanto-Movado. La prelego estis prononcita de la aŭtoro, en formo iom pli ampleksa, en la ĉi-jara studo-semajno de la germanaj Esperanto-instruistoj en Rinteln, la 30-an de aprilo 1967.

Ofte oni konstatas ĉe Esperanto-ekzamenoj kaj ankaŭ en ordinaraĵoj konversacioj, ke esperantistoj, kiuj efektive volas instrui pri la diversaj aspektoj de la movado, historio, literaturo ktp., ne scias orientiĝi en la amaso da ekzistanta materialo. Tio ŝuldiĝas grandparte al la manko de informiloj kaj enkondukaj verkoj, por tute ne menciigi la ĉiam pli akresentatan mankon de fakaj (esperantologiaj) bibliografioj.

Certagradan anstataŭaĵon, kvankam ne sisteman, povas prezenti la recenzaj rubrikoj de tiu ĉi revuo. Tiupunkte ankaŭ la Informilo de IEMW faras sendube taŭgajn servojn per la notado de enirintaj novaj materialoj.

Efektive, ni posedas nur unu sisteme ordigitan katalogon de nia literaturo, t.e. la Katalogo de IEMW. ⁽¹⁾ La bibliografio de Stojan ⁽²⁾ ankaŭ sekvas certan ordon, sed la sistemeco de ĝia detala klasifo tamen estas preferinda. La manko de ambaŭ eldonaĵoj estas, ke ili preskaŭ tute forzignas gazetajn artikolojn kaj unuopajn eseojn en libroj, kiuj ofte prezentas tre valoran kaj ilustran materialon. Entute la artikoloj en la fakaj revuoj estas la forĝejoj de ĉiuj sciencoj. ⁽³⁾

Ekzistas, tamen, almenaŭ unu granda Esperanto-biblioteko, kiu distingiĝas per mirinda kaj admirinda sistemeco, t.e. la Biblioteko de BEA en London. Dank' al siaj kartotekoj ĝi permesas trovon de literaturo pri ĉiuj temoj. Ĝia bibliotekisto, s-ro M. C. Butler, aranĝis ĝin laŭ la Decimala Klasifo, kiun li adaptis al la bezonoj de Esperanto-biblioteko. Tiun sian mirindan laboron li publicis en sia libro: Klasifo de Esperantaj Temoj, 1952, kiun mi sekvas en la aranĝo de mia nuna prezento.

Ĉar mia nuna referato havas antaŭ ĉio celon pedagogian, t.e. konatigi vin kun kelkaj gravaj verkoj pri difinitaj temoj, mi priskribos ĉefe nur tiajn librojn; kiuj hodiaŭ estas haveblaj, ĉu per la libroservoj, ĉu per la grupaj biblio-

tekoj. Iafaje esceptoj tamen trudiĝos pro la historia gravo de iuj verkoj. Principe mi ankaŭ preteratentos gazetajn artikolojn, ĉefe se temas pri malnovaj jarkolektoj.

[Butler dividas jenajn fakojn:

E 01/09 La Esperanta Movado;

E 1/9 La Esperanta Lingvo;

0/9 Aliaj temoj. Sub ilin klasifiĝas ankaŭ la interlingvistiko;

(41) kaj la originala literaturo (812).]

E 01 Teorio de Esperanto

Sub tiun fakon devas metiĝi demandoj pri la celo de la Esperanto-movado, pri ĝia neceso, terminologio (la nomo Esperanto), organizo, evoluo kaj polemikoj ĝenerala kaj interlingvista. Nu, oni trovas literaturon pri tio en multaj manlibroj, informaj broŝuroj kaj aliaj eldonaĵoj. Pri la Bulonja Deklaracio ekz. oni hodiaŭ kun profito legos la komentojn de Albault. ⁽⁴⁾

El la siatempaj polemikoj kun la idistoj mi ne volas ion menciigi, ĉar tiuj verkoj hodiaŭ ne estas plu atingeblaj kaj havas nur ankoraŭ historian valoron.

Nepre menciigi mi nun devas kelkajn malgrandajn manlibrojn, kiuj devus troviĝi en la biblioteko de ĉiu interesita esperantisto:

J.R.G. Isbrücker: Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado, Den Haag 1938.

Tiu libro, kvankam ne ĝisatingante la hodiaŭan staton, tamen prezentas solidan bazon por unuaj informoj pri la lingvo, ĝia historio kaj movado. Kvazaŭ suplementon al tiu verko oni povas rigardi alian libron de la sama aŭtoro, kiun li kuneldonis kun Støp-Bowitz:

La Esperanto-Movado, ĝia historio, organizo kaj nuna stato, Oslo 1948.

La verko, kvankam ankaŭ ĝi ne povas pritrakti la evoluon de la lastaj 20 jaroj, estas tamen utila kaj studinda. Ĝi, cetere, donas resumajn skizojn pri la movado en Skandinavujo kaj Islando. En tiu kunteksto mi ankoraŭ menciigu broŝureton de W. F. Kruit:

Lingvo kaj Movado, (1951).

Ĝi donas tamen nur plej unuajn informojn. Alia libro, kiu ankaŭ prezentas bonan enkondukon, estas de:

(4) André Albault, en: L. L. Zamenhof: Fundamento de Esperanto, Marmande (EFE) 1963, p. 31-39.

(1) Hugo Steiner: Katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, Parto I, Wien (IEMW) 1957; Parto II, Wien (IEMW) 1958.

(2) P. E. Stojan: Bibliografio de Internacia Lingvo, Genève (UEA) 1929.

(3) Bonan komencon en tiun direkton siatempe faris Paul Neergaard en: Esperantologio 1(1949/55)73-76, 133-36, 228-34. Samajn provojn vd. en LSS 23(1960)47-50, 99-101; 24(1961)24-29.

G.P. de Bruin: Gvidilo tra la Esperanto-movado, s.j. (=1936). Ĝi estis eldonita de SAT kaj de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj, kiuj, cetere, eldonis tre valorajn verkojn. ⁽⁶⁾ Ĝi prezentas ĉion sciindan kaj interesan en klara kaj simpla maniero.

E 02 Manlibroj kaj Sistemaj Informiloj.

Ĉi tien apartenas diversaj demandaroj kaj t.n. katekismoj, kiel ekz. la Demandaro de Ladevèze (1911), longe elĉerpita, sed siatempe utila. Hodiaŭ havebla estas verketo de Helena Honesta: Kiu kion scias? (Szeged 1963). Sed ĝi pli taŭgas por ia klubvespero ol por serioza studado.

E 03 Alfabetaj Verkoj

Sur tiu ĉi loko ni devas menciigi vere monumentan entreprenon, kies elĉerpigon oni ne povas sufiĉe bedaŭri. Mi parolas pri la

Enciklopedio de Esperanto, aperinta en du volumoj kun sume 600 paĝoj (plus multaj fotoj) en Budapeŝto ĉe Literatura Mondo, en 1933-35. Ĝin redaktis L. Kókény kaj V. Bleier. Tiu verko multrilate ĝis hodiaŭ restas valida kaj fidinda konsultilo, kvankam ĝi ne povas konsideri la lastajn 30 jarojn. Kiu volas serioze labori pri difinitaj temoj aŭ kiu volas prepari sin por la Int. Ekzameno de UEA, tiu devas nepre koni kaj studi tiun verkon. Ĝi estas hodiaŭ tre malfacile havebla, sed verŝajne la malnovaj grupoj ĝin posedas.

E 04 Okazaj Traktaĵoj.

Estus nun la tempo paroli pri la antaŭe menciitaj ĝeneralaj informaj broŝuroj. Ili dum preskaŭ la tuta ekzistado de Esperanto aperis en grandaj kvantoj, sed ne ĉiam en bona kvalito. (Eĉ post la Principaro de Frostavallen oni ankoraŭ iam tiam diletas!) Citi ilin ĉiujn estus interese nur el gustosociologiaj kaŭzoj. Unu tian eldonaĵon mi tamen volas menciigi pro ĝia granda disvastiĝo:

J. Borel: Die Frage einer internationalen Hilfssprache und das Esperanto.

De tiu broŝuro, por la tiama tempo sufiĉe bona, mi posedas la 9an kaj la 16an eldonon (1908). Tiu alteco de la eldonkvanto montras, ke la broŝuro tiam trovis sian vojon al la publiko. ⁽⁶⁾

Ni nun denove devas okupiĝi iom pli detale pri du rimarkindaj kaj ampleksaj libroj:

1) La "Ora Libro de la Esperanto-Movado 1887-1937", kiu estis eldonita okaze de la 29a UK en Warszawa, 1937. Ĝi aperis ankaŭ ĉe

LM. Ĝi ne nur donas historian bildon pri la movado ĝis 1937, sed ankaŭ mallongajn biografiojn de konataj pioniroj, eldirojn de famaj esperantistoj, ktp. En tiu verko aperis tri valoraj studoj: G. Waringhien: Historia skizo de la Esperanto-movado (represita en "Lingvo kaj Vivo", p. 397-423).

F. Szilágyi: Liriko en Esperanto;

K. Kalocsay: La kvindek jaroj de la lingvo. Tiujn artikolojn oni legas ĝis hodiaŭ kun granda profito.

2) Alia grava verko, bedaŭrinde jam elĉerpita, estas:

La Internacia Lingvo (Faktoj pri Esperanto), London (CED) 1954.

Ĝis nun la libro, kiun redaktis Ivo Lapenna, estas la plej bona informilo kaj oni nur povas deziri, ke la dua eldono baldaŭ eliros. Bonaj suplementoj al tiu verko estas la dokumentoj de CED, kies abonon mi rekomendas al vi.

E 058 Jarlibroj.

Mi nun devas fari mencion de la diversaj jarlibroj kaj adresaroj aperintaj kaj aperantaj: inter ili elstaran lokon okupas tiu de UEA, kies kolekto ekde 1908 prezentas tre valoran helpon por la studado de la historio de la ĝenerala movado kaj de UEA speciale. Tiu Jarlibro por multaj esperantistoj fariĝis nemalhavebla. Jarlibron ankaŭ eldonas SAT, KELI, IKUE, kaj, siatempe, la Lingva Komitato. — Inter la Adresaroj por la historiistoj aparte gravas tiuj, kiujn Zamenhof komencis eldoni en 1888, kaj kies fotorepreson oni nun atendas.

E 068 Kongresoj.

Tre valoran historian materialon sendube ankaŭ prezentas la diversaj kongresaj eldonaĵoj. Precipe la antaŭmilitaj estas tre instruoplenaj, ĉar ofte ili enhavis ankaŭ raportojn de la Akademio kaj aliaj institucioj. Ofte ankaŭ estis eldonitaj specialaj kongresaj gazetoj. — Dum tiuj dokumentoj formas la fontojn, al kiuj niaj historiistoj devas aliri, la normala esperantisto povas certe limiĝi al iuj priskribaj historiaj verkoj.

E 09 Historio de Esperanto.

Da ili ni disponas relative multajn, sed neniun, kiu konsiderus ankaŭ la postmilitan evoluon de l' aferoj. (Unu escepton ni vidos poste.) Kvankam kelkaj elĉerpiĝis, ni tamen notos ilin kronologie, ĉar ankaŭ la nedisponeblaj estas gravaj:

1911: Andreo Fiŝer: Historieto de Esperanto (Premiita ĉe la literatura konkurso de la VII-a UK de Esperanto en Antwerpen), Tiflis 1911. Nu, ĝi tute malaperis kaj ne donas ion novan. Ĝi ne estas elstare valora.

1912: Edmond Privat: Historio de la lingvo Esperanto, Unua Parto, 1887-1900, Genève. Tio estas la unua eldono de la tre konata kaj jam klasikiginta libro de Privat, kiu estas, same kiel lia Zamenhof-biografio, ĝis hodiaŭ

⁽⁶⁾ I.a. ili eldonis verkojn de Kabe, ĉiuj, tamen, ree elĉerpitaj.

⁽⁶⁾ Ĉar la prelego origine celis germanan publikon, tie ĉi estas faritaj grandaj forstrekoj. La libreton de Borel ni lasis, ĉar ĝi tipis por la tiama, kaj paraleloj al aliaj lingvoj facile tireblus.

Enkonduko en la libroskiencon de Esperanto (daŭrigo)

multe legata. Ĝi eĉ estas unu el la plej bonaj verkoj, kvankam multloke ĝi estas pli literatura ol historia. Vere bone fundamentitan verkon ni ankoraŭ atendas.

1913: Z. Adam (= Adam Zakrewski): Historio de Esperanto 1887-1912, Varsovio.

Same kiel la antaŭa ankaŭ tiu ĉi aperis okaze de la 25jara jubileo de la lingvo. Konsiderante la tiaman staton, la libro distingiĝas per mirinda kompleto. Eble la rekta konsultebleco de Zamenhof kontribuis al tio.

1923: K. Brüggemann: Historio de Esperanto, Dresden. Pli utile la libreto titoliĝus: Kongresaj paroladoj de Zamenhof, ĉar preskaŭ nur ilin ĝi konsideras, dum la historiaj konstatoj restas kvazaŭ nur margenaĵoj.

1927: Edmond Privat: Historio de la lingvo Esperanto, La Movado, 1900-1927, Leipzig.

Ĝi estas la daŭrigo de la antaŭe nomita verko de Privat, kaj certe la plej informriĉa. Privat ja mem travivis la priskribitajn epokojn kaj certe povis abunde ĉerpi el propraj rememoroj, kion oni fojfoje tro rimarkas kaj kio ne ĉiam estas tute adekvata al ia historia ekzaktecio.

1931: Alian, tre instruan historian verkon, kvankam iom tendenca, skribis tre talenta rusa esperantisto:

E. Drezen: Analiza historio de Esperanto-Movado, Leipzig.

En la antaŭparolo Drezen prezentas siajn intencojn: "Tiu Historio celas prezenti kvazaŭ certan komenton de la faktoj de esperanto-historio — komenton, kiu donus laŭpove socialan analizon por tiuj ideoj kaj fortoj, kiuj dum certaj periodoj regis kaj antaŭenpuŝis la esperanto-movadon, kiuj markis certajn periodojn de tiu movado."

Kvankam multrilate fuŝa, falsa kaj erariga, mi devas menciigi kolosan entreprenon, historion de Esperanto en tri volumoj:

1964-66: Léon Courtinat: Historio de Esperanto 1887-1960, Bellerive-sur-Allier.

La verko ampleksas 1332 p. Bedaŭrinde ĝi estas farita de diletanto, ĉar ĝi estas pure kronologia elnombrado de faktoj kaj faktetoj, multaj miscitoj kaj aliaj gravaj eraroj. Tre ĝenaj estas ankaŭ abundego da preseraroj. En la sola represo de la Zamenhofa reformprojekto (1894) mi trovis centojn da eraroj. Tial mi povas rekomendi la verkon nur al tiuj, kiuj jam havas solidajn sciojn pri la traktitaj aferoj kaj kiuj kapablos kribri la malĝustaĵojn disde la taŭgaĵoj. — Valoraj estas tamen la multaj fotoj kaj la listoj pri nova literaturo en la koncernaj jaroj.

Verko tre utila estas la "Dokumentoj de Esperanto" de A. Möbusz (Berlin 1921). Ĝi estas kolekto de ĉiuj gravaj dokumentoj ĝis 1921, ekz. la paroladoj de Zamenhof, pri la L.K., pri la C.O. de Sébert, kongresaj regularoj kaj aliaj aferoj.

Antaŭ ol transiri al la dua parto de nia referato, ni devas ankoraŭ menciigi kelkajn specialigitajn historiajn librojn, nome unue la tre interesan verkon de la jam menciita G. P. de Bruin:

Laborista Esperanta movado antaŭ la [1a] mondmilito, (Paris 1931).

Ĉar ĝi estas elĉerpita, oni prefere uzos hodiaŭ la

Historio de S.A.T. 1921-1952, Paris 1953.

Ĝi estas verko tre interesa pri unu el niaj plej grandaj organizaĵoj, kiu, precipe dum la vivo de Lanti, disvolvis tre viglan agadon, ankaŭ kaj ĉefe sur literatura kampo. Hodiaŭ ĝi fariĝis sensignifa. Fine mi mencias tre bonan kaj instruivan verkon de H. A. de Hoog:

Nia historio, 1961.

Temas pri la historio de KELI, kiu povas interesi ne nur la membrojn de tiu organizaĵo.

Landaj historioj

Krom tio aperis aro da verkoj pri la historio de Esperanto en unuopaj landoj, el kiuj menciitaj estu:

Behrendt: Deutscher Esperanto-Bund e.V., Ein Rückblick auf 25 Jahre (1906-1931).

Pri la stato de Esperanto dum la nazia tempo oni kun granda profito legos la bonegajn studojn de mia amiko Ulrich Lins, kiujn li aperigis en GER. (7) Aperis krome: Historio pri la Jugoslavia Movado de Marinko Gjivoje, kiu, pro limita eldonkvanto, ne multe diskonigos. Tute nekonata estas hodiaŭ libreto pri la movado en Saratov. (8) Pri la bulgara movado mi mencias:

Ada: Rememoroj de esperantisto, Sofia 1925. — Kaj la bonan broŝuron de Canko Murgin: Historio de Bulgara Esperanto-Movado; sed ĝi pritraktas nur la jarojn 1885-1890.

Tio, en fluga resumo, estas la ĉefa literaturo pri la movado. Pri la multaj ellasoj neniu pli konscias ol mi mem. Sed analizi al vi ĉion, estus ne nur tro temporabe, sed ankaŭ rekte senutile, ĉar multaj verkoj nur polviĝas en bibliotekoj kaj delonge estas ekster nia atingopovo. Kaj la verŝajno, ke ili estos represitaj, momente ne tre grandas.

Tamen mi iel flatas al mi, ke malgraŭ la mankeco de mia referato, ĉe tiu aŭ alia mi sukcesis bruligi ian sparkon de interesiĝo, ke li eksentas la deziron trafosi mem tiun movadon. Kaj se mia supozo hazarde estus ĝusta, la celo de mia prelego estus jam perfekte plenumita. (9)

(7) Ulrich Lins: Esperanto dum la Tria Regno, en GER 19(1966)76-78, 99-101; 20(1967)5-8.

(8) Historio de Esperantista movado en Saratov (1887-1912), trad. el rusa lingvo D-ro N. A. Kabanov, Moskvo 1913.

(9) Ni planas, en daŭrigoj, okupiĝi ankaŭ pri la Lingvo mem (Gramatiko, Vortaroj, Stilstiko ktp.), Interlingvistiko, Originala Literaturo de Esperanto, Esperanta Gazetaro kaj Eldonejoj.

Cie tra la mondo, kie sonas la Lingvo Internacia, en kongresoj, societoj kaj specialaj kunvenoj oni solenis en la lastaj semajnoj la memoron de Julio Baghy. Lia kontribuo al la vivo de la lokaj Esperanto-societoj — ĉu per la internacie uzataj legolibroj, ĉu per la eminente deklamo-taŭgaj versaĵoj, ĉu per drametoj kaj skeĉoj — estis ĉiam tiel granda, ke lia malapero estas tute aparte sentata en la societa medio.

Reliefo inaŭgurita

En la naskiĝurbo de Baghy, Szeged, Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj -Biblioteko aranĝis daŭran ekspozicion por honori la mortintan verkiston. Prof. Ernő Farkas, gvidanto de la Muzeo, malfermis la ekspozicion per parolado pri la vivo kaj verkoj de Julio Baghy. La ekspozicio prezentas proksimume cent dokumentojn pri la verkisto kaj preskaŭ ĉiujn liajn Esperanto-verkojn, eĉ ankaŭ la tradukojn en naciaj lingvoj — germana, ĉina,

franca, estona, sveda, hungara ktp — faritaj laŭ la Esperantaj originaloj.

En Szeged oni ankaŭ inaŭguris grandan reliefon de la poeto faritan de skulptistino Ilona Dudás kaj samtempe ankaŭ bone sukcesintan buston skulptitan de s-ro István Zoltánfi.

La loka gazetaro raportis pri la ekspozicio, kiun jam vizitis multaj personoj el diversaj partoj de Hungarujo kaj Jugoslavio.

En Budapeŝto okazis solenaĵoj en ĉiuj grupoj: ĉe la pedagogoj, ĉe la fervojistoj, en la grupoj Egressy kaj Konkordo kaj en la Esperanto-Rondo Amika, kiun fondis Baghy mem en 1921. Festparolis i.a. prof. Kökény, Pechán, d-ro Jáki, s-ro Balkányi.

Ankaŭ en Rotterdamo — por preni nur unu ekzemplon el ekster Hungarujo — la kunvenantoj staris silente memore al la poeto. Srdjan Flego, direktoro de Internacia Arta Teatro, kiu en Budapeŝto pasintjare tiel sukcese enscenigis la vodevilon "La holanda pupo" de Baghy, deklamis unu el liaj verkoj.

Malofte en la historio de Esperanto la funebro estis tiel kora kaj tiel universala.

LA 19-A IFEF-KONGRESO EN FULDA

La Fervojista Kongreso okazis de la 6-a ĝis la 12-a de majo 1967 en la ĉarma barokurbo Fulda. Partoprenis ĉ. 500 kongresanoj el 18 landoj. La Kongreso ĝuis multajn favorojn kaj helpon flanke de la fervojaj aŭtoritatoj. Tre taŭga kongresejo, la Oranĝerio, grave kontribuis al la sukcesigo de la Kongreso.

Post tre vigla interkona vespero, la inaŭguro okazis dimanĉmatene la 7-an de majo. Kiel unua honora gasto parolis d-ro E. Schlessner el Luksemburgo, la Prezidanto de la Federacio Internacia de Fervojistaj Asocioj Artaj kaj Kulturaj (F.I.S.A.I.C.), kies membro estas IFEF. La parolanto esprimis sian grandan simpatian kaj komprenon pri la laboroj kaj celoj de la fervojistoj-esperantistoj. Por la urbo Fulda parolis la vicurbestro. Sekvis vico da oficialaj reprezentantoj: de la Germana Federacia Fervojo, de ĝia Sociala Organizo, de la Fervojistaj Sindikatoj kaj de la Esperanto-organizaĵoj. La Estraro de UEA delegis la direktorinon de la Centra Oficejo, kiu akcentis i.a. la gravecon de la transiro de IFEF de Kunlaboranta al Aliĝinta Faka Asocio de UEA. Aparte menciinda fakto estas, ke ĉiuj parolantoj nome de oficialaj instancoj ne-esperantistaj faris la penon antaŭe prepari kaj tradukigi sian paroladon kaj ili elparolis ĝin en bona Esperanto. Salutis la Kongreson reprezentantoj de 16 landoj. Post tio la Prezidanto de IFEF, s-ro K. G. J. de Jong, faris sian inaŭguran paroladon. La festparoladon faris d-ro Werner Bormann, kiu klare analizis

la bezonon de komuna internacia lingvo kaj la solvon, kiun prezentas Esperanto.

Dum eleganta festa bankedo aŭdiĝis multaj tosto, kiuj i.a. tre prave laŭdis la bonegan organizon de la Kongreso.

Vespere de la sama dimanĉo okazis grava kultura evento: trupeto el Parizo donis alt-nivelan prezentadon de la satira komedio "Ĉu vi konas la laktovojon?" de la konata germana aŭtoro d-ro Karl Wittlinger, en la traduko de Gernot Ritterspach. La aktoroj, Michel Audi-bert kaj JOTO, rikoltis grandan sukceson. La teatraĵo, kiu en unu sezono en Germanujo atingis 1200 prezentadojn, estas tradukita jam en ok da naciaj lingvoj. La aŭtoro, kiu mem ĉeestis, sekvis la Esperanto-tekston kun granda interesiĝo. IFEF estas aparte gratulinda pro tiu ĉi iniciato.

Ekspozicio pri Esperanto kaj la Germana Federacia Fervojo estis alloge aranĝita en la apuda palaco.

Bele eldonita kongreslibro donis sennombrajn informojn, dum aparta broŝureto enhavis la detalan programon.

La subskribinto forveturis dimanĉvespere kun la konvinko, ke la bonega komenciĝo garantias sukceson ankaŭ por la postaj tagoj, kaj kun la forta impresio, ke la fervojistaj esperantistoj laboras en sia medio en tre favoraj cirkonstancoj. Apartan komplimenton meritas la LKK pro la efika organizo.

M. H. Vermaas

esperanto
junio 1967

PETR BEZRUC – POETO DE PATOSA SPITO



La poeto

Trioble aktuala estas ĉi tiu artikolo: pro la centjara datreveno de la poeto, pro la fakto, ke ĉi-jare aperos lia poemaro "Sileziaj Kantoj" kiel n-ro 8 en la Serio Oriento-Okcidento de UEA, kaj pro la proksimeco de la Jaro de Homaj Rajtoj 1968.

En tempo de perforta asimilado de la ĉeĥa nacio Bezruč ludis unikan rolon kiel per-pluma batalanto kontraŭ nacia, precipe lingva diskriminacio, kontraŭ la "kruda fremdula pugno, kiu de lipoj de la infanoj ŝiras mortantan lingvon". "Lerneĵ' germaniĝis, poliĝis preĝejo", kaj "preĝas en lingvo sinjora la ĥor" ... eĉ mem la ĉeĥa malplimulto ne malofte hontis pri sia nacieco: "Kiam la gastoj en domo festenas, for la patrinon! Aŭdigi ŝi emas damnitan lingvon parian..." Bezruč jen bolas je kolero kontraŭ la fremdaj regantoj, jen honte lamentas pri sia propra "muta popolo, gent' estingiĝanta".

Specimenaj poemoj kaj ceteraj informoj estas troveblaj en senpaga broŝuro ricevebla ĉe Památník Petra Bezruče, Opava, Ĉeĥoslovakujo.


Estas malmultaj okazoj soleni cent jarojn depost la naskiĝo de tiaj poetoj, kia estas Petr Bezruč — poetoj de socilukta partopreno kaj samtempe de eksterordinara artisma alteco. Malmultaj penetris tiel profunden en la sorton de piedpremata nacio kiel Petr Bezruč, kaj malmultaj scipovis ekkrii per voĉo de tia poezia forto. Petr Bezruč — la aŭtoro de unu-sola libro — estas ne nur elstara personeco de

la ĉeĥa nacio, sed ankaŭ poeto de tutmonda signifo. Lia jubileo estas prave solenata kiel tutmonda kultura datreveno.

Situacio de la ĉeĥa nacio

Lia propra nomo estas Vladimír Vašek. Li devenas el intelektula familio de gimnazia profesoro en Opava: la patro Antonín Vašek fondis la unuan ĉeĥan gazeton en Silezio kaj estis eminenta filologo. Necesas menci, ke en la tempo de la naskiĝo de Bezruč (nask. 15.9.1867 en Opava, mortis 17.2.1958 en Olomouc) estis Silezio same kiel Moravio kaj Bohemio parto de la aŭstria monarkio sub Habsburga dinastio. La sorto de la ĉeĥa nacio en Aŭstrio estis tre malfavora, sed la situacio de ĉeĥoj en Silezio estis ankoraŭ multe pli komplika. Silezio — malgranda lando sur limo de Moravio, prusa Klodzko kaj prusa Silezio, pola Galicio kaj hungara Slovakio — estis malproksime de la interesoj de ĉeĥaj politikistoj en la bohemia ĉefurbo Prago. En iuj partoj de Silezio, precipe en la ĉirkaŭaĵo de Ostrava kaj Těšín, okazis en la 19-a jarc. rapidega industriiĝo konekse kun la troviĝo de ŝtonkarbo, kaj ĉio ĉi logis aron da aventuristoj kaj diversnaciaj fremduloj, kiuj profitis el la komplika sociala situacio antaŭ ĉio je malprofito de la ĉeĥa popolo. La feŭdoposedanto de la Těšín-a Kamero estis la ĉefprinco Frederiko el la Habsburga familio, fama denaciiganto, pli poste generalstaba estro de la aŭstria armeo dum la Unua Mondmilito (Bezruč lin bildigas kiel markizon Gero).

La familio de Vašek estis de la germana reganta tavolo forpelita el la silezia ĉefurbo Opava, kaj Bezruč poste vivis preskaŭ la tutan vivon en moravia Brno. Jam en la gimnazio li tiel spirite elkreskis, ke li perdis intereson



Maldekstre: Kastelo en Hradec, apud Opava, la naskiĝurbo de Petr Bezruč. Hodiaŭ ekzistas en Opava Memordomo pri la poeto, kun konstanta ekspozicio de liaj verkoj kaj rilataj dokumentoj.

pri la kurantaj manifestiĝoj de patriotisma vivo, kiuj ŝajnis al li malplenaj kaj malsinceraj. Dum la universitataj studoj en Prago li trapasis profundan animan krizon, neniuj filozofia sistemo kontentigis lin, ĝis fine neatendite li fuĝis el Prago al la familio en Brno, sen intereso pri kio ajn, en stadio de profunda disrompiĝo de la personeco. Li ekpostenas ĉe la poŝto, ĉe kiu li eltenis la tutan vivon.

Literaturista disvolviĝo

La literaturaj komencoj de Bezruč estasigitaj jam kun la gimnazia kvara klaso, kaj, en la pluaj fazoj de kreado,igitaj al restadoj en la naska Opava-regiono kaj al studoj de la romgrekaj antikvaĵoj kaj de la klasika arto, li atingas fine individuan vidon de realeco kaj apartan originalecon. Al lia mensa evoluo sendube kontribuis restado ĉe la poŝto en Místek en la jaroj 1891-93, kiam li de proksime ekkonadis la Těšín-an Silezion kun ties problemoj socialaj kaj naciecaj. Kvankam li jam en j. 1889 elpaŝis sur la paĝoj de la humura gazeto "Švanda dudák" kun realismaj prozaj skizoj "Studaĵo el Café Lustig", kiel poeto kun pseŭdonimo Petr Bezruč li fariĝis konata nur en la jaro 1899, kiam la presigo de kelkaj poemoj en beletra aldonaĵo de la praga gazeto Čas (Tempo) vekis veran sensacion en la ĉeĥa mondo literatura kaj publika, precipe en Silezio. Laŭ insistado de la publiko kaj de la redaktoro de Čas Jan Herben, konsentas fine Bezruč, kiu restas en profunda anonimeco,

ke en la jaro 1903 aperu liaj poemoj en kolekto sub la titolo Silezia Numero, en la jaro 1909 poste sub la titolo Sileziaj Kantoj.

Tradukoj en 27 lingvoj

De tiuj tempoj aperis dekoj da eldonoj de Sileziaj Kantoj en la ĉeĥa lingvo, sed ankaŭ en dudek sep lingvoj de la tuta mondo — ĉu temas pri la tuta poemaro, ĉu pri bibliofilaĵoj, antologioj, gazetoj ktp. Egan resonon vekis ĉi tiuj okdek poemoj de Bezruč en la artoj figuranta kaj muzika, kaj ekzistas jam pli ol kvarcent komponaĵoj laŭ tekstoj de liaj versoj. Sileziaj Kantoj estis komprenataj dum malfacilaj tempoj de la ĉeĥa nacio kiel klariono invitanta al batalo kontraŭ la okupantoj, en la laborista movado kiel alvoko al spito kontraŭ la subpremantoj.

Bezruč — apologiisto de prometea idealo, batalema kaj senkuraĝigita, pasia kaj rezignanta, staranta tie ĉi kiel Ahasvero de konscienco de l' ĉeĥoj — kiel li sin mem en unu poemo signis, kiel la Beskida popola rabribelista Ondráš, kiel bardo de la silezia popolo, kiel freneza ribelulo kaj ebria kantisto, kiel misaŭgura noktuo sur la Těšín-a turo — tiom kaj ankoraŭ multe pli da aspektoj surprenis lia poezio. Temas pri poezio ama kaj ankaŭ alarmanta en batalon, pri poezio de aŭtoro fakte tutmonda, kies verko defendas rajtojn de la homo kaj de nacioj, kaj la popolojn por la paco kunigas.

literatura datreveno

SUBTILAJ DANĜEROJ

socia psikologio

Se iu individuo venas al grupo, kiu laboras por difinita celo (ekzemple Esperanto), pro personecaj motivoj kelkfoje eĉ ne rimarkataj de li mem, kiel ekzemple eskapo el angora solecosento aŭ sopiro al personeca manifestiĝo, tiu individuo transformiĝos sendube en malhelpo-faktoron por la grupaj celoj tial, ke ĉe sia animfundo li mem ne estas aparte interesita pri ili.

La idealismo ĉe la komenco de la laboro por Esperanto sufiĉis por fari mondampleksan internacilingvan movadon. Sed tiu idealismo devas esti modifita nuntempe per realismo. Ni bezonas energion, intereson, studkapablon por rimarkadi la senfinan ŝanĝiĝadon de ĉio, kio nin ĉirkaŭas, kaj precipe de ni mem.

Nuntempe povas okazi, ke iu lernas, instruas kaj laboras por Esperanto nur por atingi difinitan nombron da personoj (kiel eble plej grandan), kiuj ĉeestos la "spektaklon" de lia manifestiĝo. Kiam li kontentigis tiun deziron, kiun ni povus nomi infaneca, la demando, ĉu tiuj "ĉeestantoj" poste partoprenos la movadon de la Internacia Lingvo, havas por li malmulte da signifo. Li sekve okupiĝas pli pri kvanto ol pri kvalito de la lernantoj. Kelkokaze povas esti, ke tiaj personoj fakte timas (kons-

cie aŭ nekonscie), ke la "ĉeestantoj-geler-nantoj" restos en la movado kaj perfektigos sian lingvoscion, ĉar tiel ili povus fariĝi "danĝeraj konkurantoj".

Jen eble la kialo por la kistiĝo de grupestroj en siaj postenoj dum pluraj jaroj, de tiuj, kiuj ne scias sin retiri ĝustatempe. Por ili ne gravas, ĉu la lernantoj parolos Esperanton flue, nek novaj instrumentoj por lingvoj, nek la profunda studo de la strukturo kaj la dinamiko de individua aŭ grupa penso.

Cio ĉi tute ne signifas, ke tia individuo estu forpelata de la grupo per kondamno aŭ per indiferenteco. Ĝi eĉ ne signifas, ke li estu senkulpigata. Male, havante sent-kurenton grupan kiel nepran bazon, ĉiuj membroj bezonos unuigi siajn klopodojn por helpi la menciitan individuon malkovri siajn malsanajn tendencojn tute malutilajn por li kaj por la asocio, al kiu li eniris.

Necesas vidi la homan problemon kiel tuton, en ĉiuj ĝiaj facetoj, nepre komencante ekde sia propra problemoj. Tiel ne nur ni laboros pli bone por la Internacia Lingvo, sed ĝi helpos nin esti mem pli taŭgaj.

Rubén Feldman-González

esperanto
junio 1967



*Afiŝoj en la nov-hebrea
lingvo en strato
de Jerusalemo*

LA LINGVOJ DE LA HEBREOJ

Dum centoj da jaroj la hebrea popolo vivadis dissemita tra la vasta mondo. Ke ĝia scio de la hebrea lingvo ne malaperis ĝisfunde kaj por ĉiam, oni povas grandparte atribui al la Biblio. Sen ĝi hodiaŭ plu ekzistus nek la hebrea lingvo, nek la hebrea popolo.

La hebrea, nome, rolis en la fremdaj landoj unuavice kiel lingvo liturgia. Tamen en iuj regionoj aperis en tiu ĉi "sankta lingvo" ankaŭ floroj de profana literaturo, el kiuj estas menciindaj interalie gravaj filozofiaj verkoj, ekestintaj dum la Ora Periodo de la iberiaj judoj, kaj samloke kaj samtempe la mirindaj poeziaĵoj de Jehuda Halevi kaj Ŝlomo Ibn Gabirol.

En Eŭropo: du novaj lingvoj

En kelkaj partoj de Eŭropo la medio influis la alvenintajn judojn tiel, ke ili akceptis por regula uzo la lingvon ilin ĉirkaŭantan, iom ĝin forminte laŭ siaj bezonoj. Tiel ekestis en la Mezepoko du idiomoj, kiujn oni rajte nomas novaj lingvoj.

En germanaj landoj ekestis la lingvo jida (en Esperanto antaŭe nomata 'jud-germana'),

kies bazo estas la malnova germana lingvo, al kiu aldoniĝis radikoj el la hebrea. Tiu lingvo tre disvastiĝis inter la judoj en Germanujo kaj en landoj orienteŭropaj, kien tiuj judoj plumigris kaj kie ĝi pliriĉiĝis per nombro da slavlingvaj esprimoj. Dum la paso de tempo ĝi fariĝis por pluraj milionoj da homoj preskaŭ la sola interkomprenilo, sed krome pruviĝis sukcesa literatura instrumento. Iuj jidaj verkistoj estas famaj tra la mondo; tre konataj estas ekzemple la nomoj Ŝolem Aleĥem, Ŝalom Aŝ, la usona poeto Morris Rosenfeld k.a. Ankoraŭ nun parolas la jidan konsiderinda parto de la orienteŭropaj hebreaĵoj, precipe la polaj, kaj hebreaĵoj en preskaŭ ĉiuj partoj de la iama Rusujo. Aperas en ĝi gazetoj (nun ankaŭ en Israelo) kaj libroj (nun plejparte en Ameriko Norda kaj Suda). La jida lingvo estas skribata per hebreaĵ literoj.

Inter la judoj de la iberia duoninsulo, aliflanke, ekestis el la hispana per aldono de hebreaĵ elementoj la sonora lingvo spaniola (en Esperanto antaŭe: jud-hispana). Ĝi estas ankoraŭ nun uzata de multaj hispandevenaj judoj, kiuj ĝin nomas "ladino". Ekde la Mezepoko oni skribis ĝin per iom adaptita hebrea alfabeto (Raŝi-skribo), sed nun jam plurajn jardekojn oni aplikas por ĝi nur literojn lati-

najn. La literaturo spaniola ne estas komparebla kun la jida. En Israelo aperas gazeto en la spaniola.

Modernigaj laboroj

En la dua duono de la dek-naŭa jarcento komenciĝis energia agado strebanta al preparo de la antikva hebrea lingvo por la esperata Reveno al la Lando de la Prapatroj, al Ciono (poezia nomo de Palestino), kies lingvo ne povos esti alia ol la hebrea. La bazon por tiu laboro kreis Eliezer Ben Jehuda (1858-1922), kiu, kun la biblia vorto-trezoro de 7704 vortoj kiel fundamento, kompilis 17-voluman vortaron enhavantan ĉiujn hebreajn vortojn tiam ekzistantajn. Tiun vortaron kompletigis J. Even Šošan, kies verko ampleksas 28 185 vortojn kun aldonaj pli ol 30 000 teknikaj terminoj en la ĵus presita nova eldono. Tiu lasta vortaro plenumos verŝajne la tujajn bezonojn.

Vortoj de la moderna hebrea lingvo estas kreataj grandparte el hebreaj radikoj kaj el antikviĝintaj hebreaj esprimoj, kiuj ricevas novan signifon. Tiu indiĝena materialo montriĝis treege elasta kaj senklopode taŭga por trafaj neologismoj, ofte tuj kompreneblaj kaj regule facile memoreblaj. Alia hejma fonto por vortokreo estas la vortaro de la parenca, fakte jam malaperinta lingvo arama. Precipe en la faka terminaro, aperas kompreneble ankaŭ iuj esprimoj ĝenerale internaciaj. La konsisto de la hodiaŭa hebrea lingvo estas tia, ke ĝia majstranto povas senpene kompreni ankaŭ la lingvon de la Biblio.

La evoluon de la lingvo kontrolas de post 1890 kompetenta supera lingva institucio. El la komenca Lingva Komitato evoluis la nuna Akademio de la Hebrea Lingvo (1956), en kiu sidas elstaraj filologoj, la plej grandaj majstroj de la lingvo.

Jam en la antaŭa jarcento aperis sukoesaj hebreaj verkistoj. Al la klasikuloj — prozistoj kaj poetoj — Mendele Moŝer S'farim, Bialik, Berkoviĉ, Ĉerniĥovski, Aĥad Haam k.a. aliĝis amaso da novaj talentoj: Natan Alterman, Lea Goldberg, Uri Cvi Grinberg, Zalman Šneur, Šmuel Josef Agnon, portanto de la Nobel-premio 1966, kaj multaj aliaj. Krome estas tradukitaj en la hebrean la plejparto de la mondliteraturaj ĉefverkoj — eminenta tradukisto de prozo kaj poezio estas Abraham Šlonski — kaj rapide aperas en ĝi ĉiuj indaj novaĵoj. Bone evoluas la hebrea faka literaturo, kaj ampleksa estas ankaŭ la hebrea gazetaro.

La hebrea kiel ŝtata lingvo

Kun la fondo de Israelo en 1948 la hebrea iĝis oficiala ŝtata lingvo. En siaj lernejoj kaj en sennombraj kursoj por plenaĝuloj, venintaj el 76 landoj, la ŝtato atingis, ke hodiaŭ ĝin majstras la granda plimulto de la loĝantaro. Por pli ol la duono ĝi estas la sola lingvo uzata.

(daŭrigo dekstre)

REVIZII "ORIGINALA VERKARO"

leteroj

Delonge la esperantologoj konstatis, ke la tekstoj en Originala Verkaro (OV) en multaj lokoj estas difektitaj kaj por filologiaj celoj ne uzeblaj. Tial mi nun decidis fari plenan kaj fundan revizion de la tuta verkaro. Ĉar mi decidis inkluzivi ankaŭ la leteran parton, mi tiucele nepre bezonas la Zamenhofajn originalojn, aŭ fotokopiojn. Simplaj kopioj ne helpas, ĉar mi ĉiam denove konstatis, ke en tiajn kopiojn enŝteliĝas eraroj, ĉar multaj ne estas spertaj pri la manskribo de Zamenhof. Tiujn fotokopiojn oni sendu al: S-ro Reinhard Haupenthal, 6603 Sulzbach, Am Bahndamm 12, Germanujo. Same mi serĉas fotokopiojn de ĉiuj aliaj Zamenhofaj korespondaĵoj, eĉ se ili jam estis ie publikigitaj, ĉar mi intencas kompletigi la tutaĵon de la Zamenhofa korespondado. Nun, 50 jarojn post lia morto, estas jam urĝa tempo tion fari, ĉar tro multe da dokumentoj jam perdiĝis. Mi tre fidus al la komprenemo kaj helpemo de la esperantistaro.

La redaktoroj de aliaj Esperanto-gazetoj estas petataj represii tiun ĉi alvokon en siaj organoj.

Kun anticipa danko,

Reinhard Haupenthal (Germanujo)

DAVID McCALLUM

Post kiam mi dum pli ol 50 jaroj penis persvadi al ĝejunuloj, ke ili interesiĝu pri Esperanto, mi trovis, ke la bildo de David McCallum en la februara "Esperanto" vekis multe pli da atento ĉe niaj studentinoj, ol ĉiuj miaj prelegoj.

George Shepherd

Newcastle, Britujo, 21 mar 67

KION ENHAVU "ESPERANTO"?

Mi devas malkonsenti kun s-ro Holzhaus (feb., p. 28) pri nekrologoj kaj lingvo-artikoloj. Nekrologoj estas malĝojigaj kaj devus esti mallongaj, sen neglekto al la ĉefaj meritoj de la mortinto. Interesiĝo pri aliaj lingvoj estas la unua paŝo al interesiĝo pri aliaj popoloj. Mi nur bedaŭras, ke mi tro malfrue ekabonis "Esperanto" por povi legi ĉiujn artikolojn kondamnitajn de s-ro Holzhaus.


Gerald Tucker

Munkeno, 21 mar 67

La hebrea estas la instrulingvo de la tre evoluanta lerneja sistemo israela: deviga instruado jam por kvinjaruloj kaj ebleco de studo en ĉiuj gradoj inkluzive la universitatojn. Tiun lingvon oni aŭdas ĉie en la lando, en kamparo kaj en urboj, en teatroj, en sportejoj, en radio. Oni legas ĝin en strataj afiŝoj kaj neonaj reklamiloj.

La hebrea lingvo komplete renaskiĝis: Infano de la Biblia Epoko vekis en niaj tagoj, kaj ĝi sentas sin hejme.

esperanto
junio 1967



red.: s-ro J. Toczyski

KELKAJ INFORMOJ PRI LA "ASOCIĜINTAJ LERNEJOJ" DE UNESKO

...la Konferenco deklaras sian plenan apogon al la projekto de Asociĝintaj Lernejoj kaj esprimas sian gratulon al Unesko..., al la edukaj instancoj de la landoj, en kiuj la Projekto estas aplikata, kaj al ĉiuj lernejoj partoprenantaj en tiu Projekto, pro la ĝisnunaj atingoj... (el la Rezolucio de la Dua Konferenco de Lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata; en julio 1966, Graz, Aŭstrujo).

Ni ricevis informpetojn de kelkaj gekolegoj pri la libro, kiu informas pri la "Asociĝintaj Lernejoj" de Unesko, sed bedaŭrinde la libro estas, laŭ informoj ricevita, tute elĉerpita. Ĉar la afero estas por ni aktuala, ni publikigas la ĉi-suban artikolon laŭ la materialo, kiun liveris al ni la Pola Nacia Komisiono por Unesko.

La projekto de Asociĝintaj Lernejoj de Unesko — aŭ pli ĝuste jam ne projekto sed programo realigata de tiu organizaĵo ĉiujare kaj sisteme en multaj lernejoj tra la mondo — en la jaro 1968 atingos 15 jarojn de sia ekzistado. En la jaro 1953 enkondukis tiun eduk-eksperimenton de Unesko 33 lernejoj en 15 landoj. Dum la pasinta jaro partoprenis jam 350 lernejoj en 43 landoj. En Pollando, ekzemple, estas 29 Asociĝintaj Lernejoj en 19 urboj.

Ĝis la jaro 1964 tiu eduk-programo de Unesko estis realigata nur en la mezlernejoj, sed de tiu jaro, laŭ decido akceptita de la 13-a Ĝenerala Konferenco de Unesko, oni povas realigi la programon ankaŭ en la elementaj lernejoj. Kaj fakte en multaj landoj jam en la jaro 1965/66 oni enkondukis en kelkajn elementajn lernejojn la programon de Unesko kun kontentiga rezulto. Kompreneble la afero postulas ankoraŭ prilaboradon por sukcese adapti la belegan programon de Unesko al la intelekto kaj interesiĝoj de junaj homoj en la aĝo de 7-13 jaroj. Tamen por ni estas aparte grava la fakto, ke ankaŭ la elementaj lernejoj povas asociiĝi.

En ĉiuj landoj la Asociĝintaj Lernejoj (kiujn ni signos de nun per "AL") estas lernejoj speciale elektitaj de la edukinstancoj kiel lernejoj progresemaj, certgrade "gvidantaj", kiuj prilaboras kaj aplikas la plej novajn, plej interesajn kaj plej efikajn metodojn en la proceso de edukado.

Principoj de la programo

La edukprogramo de la A.L. konsistas el jenaj ĉefaj eroj:

La lernejo elektas unu fremdan lingvon kiel la bazan por kontaktoj kun alilandaj lernejoj; surbaze de tiu fremda lingvo celas pli proksime ekkoni la elektitan nacion (ĝiajn viv-

kondiĉojn, ekonomion, kulturon, socion, junularan vivon);

kunagas en la interproksimigo kaj ekkono de kulturoj orientaj kaj okcidentaj;

pli larĝe, ol aliaj lernejoj, konigas al siaj gelernantoj la strukturon, la celojn kaj la taskojn de UN kaj la celojn kaj agad-manierojn de Unesko;

solene celebras la datrevenojn anoncitajn de Unesko kaj instigas la gelernantojn al studado de la vivo kaj verkoj de elstaraj sciencistoj, literaturistoj, artistoj, Nobel-premiitoj (precipe de la pac-premio), el diversaj nacioj;

kreas per la edukmetodoj konvenan etoson inter la gelernantoj por malaprobo kaj kondamno de ĉiuspecaj diskriminacioj: rasa, nacia, socia, klasa, ktp.;

unuverte: kontribuas al edukado de la junularo en spirito de reciproka, internacia interkompreniĝo, paca kunlaboro de la nacioj, reciproka konfido kaj amikeco.

La edukprogramon de Unesko la lernejoj aplikas unuavice en la instruprogramoj de la nacia lingvo kaj de lingvoj fremdaj, de historio kaj geografio, de aktualaj aferoj. Krome oni povas ĝin apliki ankaŭ en programoj de biologio, fiziko, kemio, matematiko, pedagogio kaj eĉ muziko, desegnado kaj praktikaj okupoj.

Komuneco de celoj

Ni vidas do el tio, ke en la realigado de la edukprogramo de la A.L. partoprenas la lernejo kiel tuto, do ĉiu instruisto de la lernejo devas en ĝi ankaŭ kontribui. La celoj de la A.L. tiel precize kongruas kun tiuj de la Esperanto-movado, kiu aplikas ilin en sia laboro jam de 80 jaroj, ke nia ekinteresiĝo pri la A.L. kaj evidenta volonteco kun ili kunlabori estas tute kompreneblaj. Ĉiu lerneja agado per Esperanto laŭnature havas internacian kaj eĉ tutmondan karakteron, ĉu temas pri "Grajnoj en Vento", ĉu pri "Oraj Spikoj", ĉu "Geonkloj Esperantistaj", ĉu la Infankongresetoj, SEL, TEJO, STELO aŭ multaj, multaj aliaj, ĉu pri nia junulara gazetararo, kiu estas legata ĉiam en diversaj landoj. Ni ja kreas ĉiam novajn metodojn de internacia kunlaboro, ĉar nia medio esence estas internacia.

Tutcerte la principoj de la A.L. ne estas por ni io nova, ĉar ili ja estas en la statutoj de niaj asocioj kaj en la vivprincipoj de niaj lokaj grupoj dissemataj en la tuta mondo. Kaj niaj organizaĵoj havas jam 80-jaran sperton. Kaj ni kun fiero povas konstati kaj ĝoji, ke la principoj kreitaj de nia movado, en tiom aliaj kondiĉoj, travivis du militojn kaj nun alproprigis al institucio, kiu celas eduki la anojn de la nova homa socio.

Al la realigado de la celoj de la A.L. ni povas doni tre valoran kaj tre utilan kontribuon. Ĉiu konscia Esperanto-instruisto devas nepre sciigi, kiu lernejo en lia plej granda proksimeco apartenas al la A.L., kaj proponi al la lernejo sian helpon, precipe en la fako de korespondado. Eble li povos en tiu lernejo aranĝi laŭ aprobo de la lernejestro rondeton por Esperanta instruado kaj korespondado.

Por la A.L. elektas lernejojn la landaj edukinstancoj en interkonsento kun la naciaj komisionoj por Unesko, sed en kelkaj landoj la proponon povas ankaŭ fari la lernejestro mem.

La naciaj komisionoj por Unesko en ĉiuj landoj, kie ili estas kreitaj, aperigas specialan bultenon en la nacia lingvo, en kiu oni ankaŭ raportas pri la A.L. Ni devas elprofiti la okazon, kiam iu lernejo partoprenas en iu agado kun internacia karaktero helpe de Esperanto, kaj sendi al tiu bulteno raporton, kiu devas esti nepre konciza, serioza, skribita en bonega nacia lingvo, ne havanta altrudeman propagandan karakteron kaj prezentanta nur la vere gravajn kaj vere interesajn faktojn. Povas temi, ekzemple, pri efikoj de korespondado, reciproka vizitado de lernejoj, ekspozicioj kun internacia karaktero, interŝanĝo de instru-helpiloj ktp. Se la raporto poste aperas en la bulteno en formo nur de mallonga noto, estas jam bone.

En la nunaj cirkonstancoj nia vojo al oficialigo devas iri nepre tra Unesko-kanaloj, ni devas nepre substreki ĉie kaj ĉiel nian volontecon de kunlaboro kun tiu grava organizaĵo kun kiu ni estas tamen en konsultaj rilatoj.

Realigante la decidojn de la Konferenco en Graz ni devas nepre en plej proksima tempo jam komenci ligi la kontaktojn kun la A.L. kaj ankaŭ senpere kun la komisionoj por Unesko. Proksimiĝas en multaj landoj nova lerneja jaro — oni devas jam nun posedi bone prilaboritan agadplanon por tiu jaro. Kaj ni atendas la informojn pri viaj atingoj sur tiu kampo. Ĝi estas certe ĝusta kaj nepre necesa laboro, kiu povas niajn penojn kroni per pozitivaj rezultoj.

REGIONA KUNORDIGA KONFERENCO POR ENKONDUKO DE ESPERANTO EN LERNEJOJN

De la 24-a ĝis la 26-a de marto 1967 okazis en la Domo de Sociaj Organizaĵoj en Maribor, Jugoslavio, Regiona Konferenco de reprezentantoj el Aŭstrujo, Hungarujo, Italujo kaj Jugoslavio. Reprezentantoj de Bulgarujo kaj

Grekujo, kvankam invititaj, ne povis ĉeesti. La Konferencon iniciatis d-ro Mario Dazzini (Italujo) kaj gvidis d-ro Peter Zlatnar (Jugoslavio).

Kiel indikas ĝia titolo, la Konferenco havis la celon kunordigi la lernejan agadon en la ses menciitaj najbaraj landoj. Kronreprezentantoj de la Esperanto-asocioj de tiuj landoj ĉeestis ankaŭ du oficialaj reprezentantoj de edukinstancoj: prof. Marta Cser (Hungara Ministerio por Popolklerigo) kaj prof. Dušan Kompare, kiu reprezentis la sekretarion por lernejoj aferoj de la slovena respublika registaro.

La Konferenco eldonis 17-paĝan multobligitan raporton kun resumo de la diskutoj kaj kun la oficialaj konkludoj. El tiuj lastaj aparte atentindaj estas jenaj:

La provizora preparkomitato fariĝu Konstanta Organiza Komitato de la Kunordiga Konferenco, kies sekretario estas s-ro Ludoviko Prebil, Tomanova 19, Maribor, Jugoslavio.

La Lerneja Komisiono de Hungara Esperanto-Asocio esploru la eblecon prepari instrucentron por diplomigo de instruistoj de Esperantaj lingvoj kaj literaturo. La diplomo estu oficiale donita de la kompetenta ŝtata instanco.

La landaj lernejoj komisionoj kolektadu dokumentojn kaj disponigu ilin al aliaj landaj Esperanto-asocioj.

La landaj Esperanto-asocioj organizu sinsekve seminariojn por instruistoj pri Esperanto sub oficiala ŝtata aŭspicio. La Konstanta Organiza Komitato prizorgos la liston de disponeblaj prelegantoj kaj temoj.

Oni intensigu ĉiuspecajn kontaktojn inter lernejoj, instruistoj kaj lernantoj de la koncernaj landoj.

KONSULTA KOMISIONO PRI LERNEJOJ de UEA (asocia membro de FIOCES)

Generalaĵoj kaj rilatoj kun profesiaj instruistaj organizaĵoj: S-ro Józef Toczyski, estrarano de UEA pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

Reprezentanto de ILEI: F-ino Jeanne Dedieu, 26 Ave. de l' U.R.S.S., Toulouse, Francujo.

Pedagogiaj demandoj: S-ro R. H. M. Markarian, 2, Hazel Grove, Hartwood Park, Chorley, Lancs., Britujo; tel. 4572.

Organizaj demandoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

Eksteraj kunlaborantoj:

Rilatoj kun internaciaj instancoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx, Britujo.

Altgrada instruado: Prof. J. Régulo Pérez, Apartado 25, La Laguna, Tenerife, Kanarioj.

Mezgrada instruado: D-ro M. Dazzini, Via Palestro 36, Massa (M.C.), Italujo.

Elementa instruado: S-ino R. Thorsen, Dyblandsvangen 7, Brønshøj, Danlando.

Bonvolu ĉiam turni vin al la kompetenta membro laŭ la supraj indikoj.

LA SENVELKA ROMANTIKO DE BAGHY: "ĈIELARKO"

Ĉielarko, versa fabelaro de Julio Baghy. Eld. Stafeto, La Laguna, 1966. Beletraj kajeroj n-ro 27. 111 p. 18 × 12 cm.* 4,30 gld.

Atingis min tristiga informo pri la forpaso de Julio Baghy, kun averto diri nenion ĉi-recenze, kvazaŭ li ankoraŭ vivus. Tamen mi insistas, ke li malgraŭe ĉiam vivas, kiel pruvas ankaŭ lia nova libro.

Ĉi tiuj dek du fabeloj estas plene originaloj. Prunti kaj reverki temojn estis la metodo de pluraj grandaj poetoj. Jam antaŭe Baghy uzis ĝin tre efike. Kiom pli tio refreŝigas, ol la tro multaj — ofte senvivaj — tradukaĵoj inter ni!

Iuj temoj estas: juna amo, perdo kaj homa krueleco. Ĉie montriĝas komprena kompato kaj tuŝoj de humuro. Ĉarmadas la senvelka romantiko de ĉi tiu 75-jara junulo, kiu ĉiam denove kondukas al fabellando en vojaĝoj celantaj la signifon. Sub la simpleco ofte kuŝas gravaj simboligoj. Kiel orientece plaĉa sed home kortuŝa impresas la ĉindevena "Meng Ĉiang kaj Van", pri kiu li diras:

*De nord' al sudo dum jarcentoj
la migra kanto vagabondas,
ripete ĉiam turnaj ventoj
de sud' al nordo ĝin rakontas...*

Precipe ankaŭ trafas "Minstrelo kun ĉongurio" kun la surpriza fino penetre montranta, kiel materialismo povas sufoki la Vivmistikon.

Denove evoluinta, Baghy ĉi-libre kaj ĝisfine

sin montras lerta versisto kaj atentinda poeto. Ne neglektu lian propran kaj komprenigan antaŭparolon.


Nepre aludendas lia granda servo al Esperanto kiel lingvo. Sen ajna vortgraso lia stilo, vire eleganta, elaste nuancita kaj rapidmove densa, povas servi kiel modelo por nia ofte mala-tipa prozo. Utiligo de 'neologismoj' malnovaj kiel 'lanta' fare de progresema konservativulo kiel Baghy por mi definitive metas sur ilin sigelon de aprobo.

La materia libro kontentigas.

Edwin de Kock (Sud-Afriko)



Baghy kun Kalocsay en Budapeŝto, 1959



Reproduktaĵo el "Nordvjetnamaj krokizoj"

Ham's Interpreter, de DJ Ø OY kaj DL 1 CU.

Eld. DL 1 CU, Stuttgart, 1966. 5-a eld. 52 p. 21 x 15 cm. Radioamatora frazaro 10-lingva (ink. Esperanton). 5,70 gld.*

Ĉi tiu bonekonata verko aperas nun en tri novaj lingvoj: rusa, serbo-kroata kaj Esperanto. Por la nova Esperanta parto ni ŝuldas dankon al OE3RU kaj liaj kunlaborantoj OE6MT kaj s-roj Hans M. Maitzen kaj J. Wesian.

Trafoliumante la libron oni rimarkas, ke ĝi estas direktita precipe al angle-parolantoj. Listoj aperas alfabeto laŭ la angla, klarigoj estas anglalingvaj, k.c. Aperas bona enkonduko al Esperanto kaj priskribo de ĝia gramatiko en la germana lingvo. La eldonisto klarigas sian enmeton de Esperanto per anglalingva letero: "...Esperanto prezentas vere internacian lingvon kun milionoj da subtenantoj tra la mondo... Per tiu rimedo la lingvobaroj inter radioamatoroj povus esti facile forigitaj."

Sub la sekvantaj titoloj aperas aparta priskribo en ĉiu el la dek lingvoj: Ĝenerala alvoko; Voksigno; Kiu vokis?; Esprimoj de ĝentileco; Modulado; Sub malbonaj kondiĉoj; QSL-karto; Adreso; ktp.

La nuna eldono havas kelkajn mankojn kaj difektojn, korektotajn en la venonta.

E. Lindberg (Usono)

Esperanta mozaiko, de F. Faulhaber. Eld. FLE, Haarlem, 1967. 119 p. 20 x 14 cm. 4,50 gld.*
Lingvaj artikoloj.

La 24 mozaikeroj de Faulhaber, kiel en ĉia mozaiko, ne estas egalaj: ĉiam interesaj, ili diferencas en la temo, en la amplekso, en la brilo. Ilia komuna mortero estas klara, flua, eleganta lingvo, kiu legiĝas des pli agrable, ke eĉ la plej seriozaj temoj estas spicitaj de amuzaj memoraĵoj aŭ spritaj anekdotoj.

En la mozaika festeneto, kiel ĉe bufedo, oni povas piki jen tiun ĉi jen tiun pecon, ne laŭ deviga fiksita vicordo. Jen vi frandos ĝenerallajn artikolojn, jen vi povos kun profito remaĉi pli fakajn ĉapitrojn. Ne ĉiu verŝajne ĉiam samopinion kun Faulhaber. Iuj trovos lin ekzemple tro severa koncerne la neologismojn. Mi mem ne estas fanatika neologismemulo, kaj mi ne volonte "descendas lante" ŝtuparon, sed

1) Cu oni volas tion aŭ ne, la poetoj uzas alian lingvon (ne nur gazetprozon kun rimoj), kaj, kiel ekzemplo inter mil, la vorto "lante" estas alie elvokiva ol la kaskadeska "malrapide". "Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian" ne fariĝu modelo de bela poezio

nur tial, ke ĝi estas zamenhofa kaj facile komprenebla!

2) T.n. poezia vorto ankaŭ kapablas spici nian prozon. Ĉu vi ne preferas promeni kun "pimpa" knabino, ol kun "gaje loga, dezirekscite eleganta" junulino?

Tiu ununura ekzemplo montru, kiel "Esperanta mozaiko" povus servi kiel bazo al fekundaj diskutoj dum grupaj kunvenoj. Tiuj diskutoj certe naskus la bezonon pli profunde studi, pli vaste prilabori kelkajn temojn nur flugtuŝitajn de Faulhaber (Kiu verkisto iam eldonos leksikonon de la "falsaj amikoj"? vidu p. 8).

Mi volus citi kaj ankoraŭ citi, precipe ĉiujn eltiraĵojn, kiuj rememorigas pri la granda toleremo de Zamenhof. Sed unue mankas al mi loko, kaj due mi ne antaŭe forrabu la ĝuon promesitan al la legonto. Sekvu do la proverbon

*"Al promeso oni ne kredas —
kreditu, kiu posedas"*

kaj sendu jam hodiaŭ mendokarton al via libroservo.

Louis Beaucaire (Berlino)

Vocabulario Español-Esperanto (Vortaro hispana-Esperanta), de E. Tudela-Flores. Eld. la aŭtoro, Valencia, 1966. 2-a eld. 527 p. 17 x 12 cm. Kartonbind. 13,— gld.*

Por trovi hispana-esperantan vortaron je boneco en sia tempo kompareblan al la 2a eldono de la *Vocabulario* de d-ro Tudela, necesas retroiri en Hispanujo, ĝis kiam V. Inglada Ors kaj A. López-Villanueva aperigis la 2an eldonon de sia *Vocabulario Español-Esperanto* antaŭ ĉ. 60 jaroj. Denove pruviĝis vera la aserto, ke vortaro komencas boni nur ekde la 2a eldono! Ĉi-foje d-ro Tudela ja sin eminente superis, se oni komparas la nunan kun la eldono aperinta en 1956. Ni aldonu, ĉar tio estas justa, ke la vortaro de d-ro Tudela estas pli bona kaj pli riĉa (rondcifere ĝi enhavas super 2000 pliajn vortojn krom multaj aldonaj glosoj), ol estis siatempe tiu de Inglada kaj López. Sed ne vane la esperantista leksikografio ne stagnis ekde tiam, kaj nia aŭtoro nun vaste kontribuis kelkajn el la plej bonaj nacilingvaj-esperantaj vortaroj, ekz-e tiu de Léger (ne Legère, kiel Tudela presis!) kaj Albault.

Kiam mi recenzis la unuan eldonon en "Boletín" de HEF, 1956, pĝ 352-353, mi vaste kritikis kaj fine esprimis la deziron vidi 2an tralaboritan eldonon. Ĉi ties apero ne seniluziigis min. Sed ĉu tio signifas, ke mi ne trovis kritikindaĵojn? Mi ja trovis; sed ili estas nek tiel multaj kiel en la unua eldono, nek tiel drastaj. Mi volas indiki nur du specimenojn, ĉar ja internacia gazeto ne estas loko por vaste ekzempli, kiel mi faris en 1956 por hispanlingvanoj. Jen: *calavera* ne estas 'kap-

skeleto' sed 'skeletonkapo'; *diarrea* estas fundamente 'lakso' kaj nur neologisme 'diareo', ne inverse, kiel montrite en la vortaro: tio povus erarigi nespertulojn, por kiuj ĉefe estas nacilingvaj-esperantaj vortaroj.

Sed, mi ripetas, nun la hispanparolantoj havas bonan laborilon ĉemane, por kiu mi volas senrezerve danki kaj gratuli d-ron Tudela (kiu private lanĉis la vortaron), kaj samtempe gratuli la hispanan movadon kaj la hispane parolantan Amerikon.

J. Régulo-Pérez

Kie boacoj vagadas, de Eija Salovaara. Eld.

Dansk Esperanto-Forlag, Åbyhøj, 1967. 69 p. 21 x 15 cm. Originala novelaro. 4,50 gld.*

Aperis originale verkita en Esperanto novelaro de finna verkistino Eija Salovaara. La 70-paĝa libreto "Kie boacoj vagadas" enhave frapas ĉiun per impresoplena rakontmaniero, same kiel ŝia rakonto en la kolekto "Sub la signo de la verda stelo". La libro estas dediĉita al la amata kaj neforgesebla lando de la noktomeza suno. Traleginte la novelaron oni ne povas diri, ke tiu aŭ alia novelo estas la plej bona. Ili ĉiuj tenas la atenton de leganto, kiu sopiras al eleganta kaj kolorplena stilo. La peniko, per kiu E. Salovaara pentras la belecon de la naturo kaj la solecon de la vastaj laplandaj arbaroj kaj senfinaj arktaĵaj ebenaĵoj, estas imitinda por multaj niaj verkistoj. La homa sorto, superstiĉo kaj mistiko ĉe la loĝantoj de Laplando estas la ĉeftemo.

Stanisław Świstak (Pollando)



**52-a UNIVERSALA
KONGRESO DE ESPERANTO**
Tel Aviv, 2-9 Aŭgusto 1967

Alta Protektanto: Zalman Šazar, Statprezidanto de Israelo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO N-ro 8

GRAVA INFORMO !

En la momento de ekspreso de tiu ĉi paĝo, jaŭdon la 25-an de majo 1967, la situacio en Israelo fariĝas pli streĉita de horo al horo, sed ankoraŭ ĝi ne estas katastrofa. Laŭ ĵusa telegrama informo de KKS la ambasadoj tre konsilas al samlandanoj veturi hejmen.

La Estraro de UEA estas konsideranta alternativon por la — tre verŝajna — kazo, ke la 52-a Universala Kongreso ne estos realigebla en Tel Aviv. UEA faros ĉion por okazigi la Kongreson kun la sama aŭ tre simila programo en alia lando kaj loko, kaj laŭ la antaŭvidoj ĝi sukcesos en tio.

La jam pagitaj sumoj por aliĝoj kaj mendoj restos validaj por la Kongreso, kie ajn ĝi okazos.

Ĝis la nuna momento estas registritaj 867 kongresanoj. Ĉiuj ricevos personan informon pri la definitiva decido kiel eble plej baldaŭ. Ankaŭ la tutmonda Esperanto-gazetaro kaj la radio-stacioj tuj ricevos urĝan bultenon pri la situacio.

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Nordvietnamaj krokizoj. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1966. 68 p. 19 x 17 cm. 40 reproduktajoj, antaŭparolo en Esperanto.*

La ideala nutraĵo, de Martinus. El la dana tr. C. Graversen. Dua eld. Martinus-Instituto, Kopenhago, 1965. 96 p. 19 x 12 cm., bind.*

"Ĉiuj formoj de la pasivo..." de Heinrich Friess. Eld. la aŭtoro, Germanujo, 1967. 15 p. 27 x 21 cm., multobl.

La nova jaro de Boleslav Prus; **Janko-muzikanto** de H. Sienkiewicz. Eld. Tümmel, Nürnberg, 1891; faksimila reeld. KOKO, Kopenhago, 1967. 20 p. 20 x 13 cm. Du rakontoj. 5,— gld.*

Katolika terminaro por japanaj esperantistoj, de Matubara hatirô. Eld. la aŭtoro, Japanujo, 1966. Unua parto, 40 p. 25 x 18 cm., ofsetita. 1,— gld.*

Internacia konvencio pri la fervoja pasaĝerkaj pakajtrafiko. Eld. Germana Esperanta Fervojista Asocio, Frankfurt, 1967. 44 p. 30 x 21 cm., ofsetita.

Kolora florkalendaro 1968. Eld. Reinsteg-Verlag, Germanujo. 12 p. 29 x 30 cm. Fotoj. Dulingva (germana-Esp.). Prezo: 4,— gld. por 2 ekz. (unuope ne mendebla), ink. afrankon. Mendebla ĉe past. A. Burkhardt, D-7261 Gchingen; pĉk 102549 Stuttgart. Eldonnumero 150 000 ekz.

**LA AVIADILA KARAVANO
DE UEA KAJ LA DEKTAGA
POSTKONGRESA EKSURSO**

Rilate al tiuj ĉi aranĝoj validas la sama kiel por la Kongreso mem. Ankoraŭ ni estas en granda necerteco. Por la karavano estas enskribitaj 70 partoprenantoj kaj la ekskurson mendis 78 personoj. La antaŭpagitaj sumoj por ambaŭ aranĝoj estas centpocente sekuraj, ĉar ili troviĝas ankoraŭ en banko en Rotterdam. En kazo de nuligo de la vojaĝo, la mono estos je tuja dispoŝo de la pagintoj.

☆

Ni esprimas dankon al la Loka Kongresa Komitato kaj la Konstanta Kongresa Sekretario, kiuj ĝis la nuna momento en plej malfacilaj cirkonstancoj daŭrigis la laboron. Forton kaj kuraĝon ni deziras al la israelaj esperantistoj.

M. H. Vermaas
Direktorino Centra Oficejo

STEFANO LA COLLA

Ĉi-sube ni publikigas portreton de prof. Stefano La-Colla (1889-1966), al kies memoro estas dediĉita unu ĉambro en la Domo de UEA. Kiel ni raportis jam en majo (p. 75), por la Ĉambro Stefano La-Colla la sumon de 5000,— gld. donacis lia vidvino, s-ino Averina Sforza La Colla.



Kiel konate, Stefano La-Colla fondis la Esperanto-Propagandan Centron, kiu zorgis interalie pri la tria eldono de la Plena Gramatiko de Esperanto, verkita de Kalocsay kaj Waringhien. La unua kaj dua volumoj aperis jam delonge, sed bedaŭrinde ne estis lasita al li la tempo por aperigi ankaŭ la trian. Meze en la preparlaboroj li estis forprenita. La eldonon estas finaranganta lia frato Nicola. Proksimume post unu jaro oni povos atendi la aperon de tiu lasta volumo.

LAŬLANDE

Afriko

● La agado lanĉita de IKUE por helpi afrikajn blindulojn (vidu feb., p. 29) jam alportis sumon de 666,12 gld. Kontribuojn akceptas s-ro J. A. Tuinder, Agado E3, Van Hulststraat 1, Ter Apel, Nederlando.

Argentino

● Post kunsido de Argentina Esperantista Junulara Organizo kun la Klubo de Unesko de Rosario komenciĝis en YMCA 2-jara kurso por formi Esperanto-instruistojn. Lernas 20.

Aŭstralio

● Vic-prezidanto de UEA s-ro E. L. M. Wensing dum flugvizito al Sidney prelegis en la Esperanto-klubo pri metodoj por akiri profundan konon de la lingvo kaj pri la graveco de korekta lingvo-uzo sur ĉiuj kampoj.

Brazilo

● La Ministro de Edukado, prof. Tarso Dutra, kaj la Ambasadoro de Israelo en Brazilo, d-ro Shmuel Divon, patronis kursfinan solenaĵon de lernejoj en Rio de Janeiro.

Britujo

● Okaze de la datreveno de morto de Zamenhof prelegis en amfiteatro de la Universitato de Londono la verkistino Marjorie Boulton. La anglalingvan prelegon ĉeestis ĉ. 90 personoj.

Bulgarujo

● Bulgara Esperanto-Muzeo ricevis la bibliotekon de la forpasinta akademiano I. H. Kresanov, inkluzive de zamenhofaj leteroj.

Ĉinujo

● En 1967 la gazeto "El Popola Ĉinio" aperas denove monate anstataŭ dumonate.

Finnlando

● La Finna Scienca Akademio asignis al Vilho Setälä subvencion por daŭrigaj studoj pri vortara statistiko (kp. Esperantologio vol. I, n-ro 1).

Francujo

● Nova prezidanto de Franca Esperanto-Instituto estas s-ro Jean Thierry, antaŭa redaktoro de "Franca Esperantisto". La ĝisnuna prezidanto, s-ro Michel Duc-Goninaz, eksiĝis el UFE.

Hungarujo

● La 31-an de majo festis sian 70-jariĝon prof. Ludoviko Kökény, ĉefredaktoro de la Enciklopedio de Esperanto, nun ĉefredaktoro de "Hungara Vivo".

Japanujo

● En marto 1967 s-ro Ryuji Tada, studento de la Agrokultura Fakultato de Universitato Kagawa, prezentis disertacion en Esperanto: "Studoj pri ŝanĝo de oligo-sakaridoj ekstraktitaj el sengrasigita sojo per la bakterio Escherichia coli". Ĝi estas la unua disertacio prezentita en alia lingvo, ol la japana.

Kanado

● Kanada Esperanto-Asocio unuafoje akiris propran pagitan oficejon kaj establis tie sian viglan libroservon.


Malajsio

● Ekde 1 septembro 1967 la malaja lingvo anstataŭas la anglan kiel "nacia lingvo" uzata por oficialaj celoj. Laŭ leĝoprojekto de la registaro, tamen, la angla restos uzebla, kiel en Hindujo, por parlamento, kortumoj kaj aliaj oficialaj medioj. Tio necesas, laŭ la ĉefministro, "por havi pacon kaj harmonion en la lando". Nur 15 % de la loĝantaro estas malajoj, kontraŭ ĉ. 40 % da ĉinoj kaj krome plejparte hindoj.

Usono

● Junularo Esperantista de Nord-Ameriko protestis al la Departemento de Poŝto pri altigoj de internacia afranko, pledante, ke tio malhelpas kulturajn interŝanĝojn.

Aspekto de la ekspozicio en Bengalujo en februaro ("Esperanto", majo, p. 80).



esperanto
junio 1967

Blinduloj

● Ĉe la Brajla Biblioteko de Latva S.S.R. (Riga-24, Juglas ielâ 14, Soveta Unio) fondiĝis Esperanto-rondo. Partoprenis 23. Ĝi serĉas kontakton kun aliaj blindul-bibliotekoj.

Fervojistoj

● En la Internacia Kongreso de Staciestroj estas oficiala ekde ĉi tiu jaro ankaŭ Esperanto.

Juro

● Aperis la 1-a numero de "Internacia Jura Revuo", oficiala organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. La grandformata revuo, ofsetita kun presita kovrilo, aperas en Budapeŝto sub redakto de d-ro Lajos Martón. Ĝia unua kajero pritrakta la egalrajtecon de la seksoj en la familia juro de diversaj landoj.

Jurnalismo

● Esperanto-grupo en Sciacca, Italujo, lanĉis konkurson, kiu premios per 5 000 liroj la plej bonan artikolon je la temo "Interfratigo de la popoloj", aperintan lastatempe en la sicilia gazetararo.

Kemio

● La fakrevuo "Der Chemischreiniger und Färber" (La sekipurigisto kaj tinkturisto) enkondukis resumojn en Esperanto. Jarabono (12 n-roj) kostas 40,— g.m. (36.— gld.); unuopa numero 3,50 g.m. Adreso: Verlag Walther de

Bouché, D-8 München 13, Germanujo; poŝta ĉekkonto München 68140.

Kino

● Al la listo de Esperanto-filmoj (aprilo, p. 58-9) aldoniĝas: "Aŭstralio, lando de ĉiama ŝanĝiĝo" (1966?), kolora, 10 min., 16 mm. Informas: aŭstraliaj oficejoj pri enmigro.

Kolektado

● Fondiĝis "Internacia Ligo de la Esperantistoj-Kolektantoj" (de poŝtmarkoj, moneroj, glumarkoj k.s.), kiu eldonas multobligitan organon "Kolektanto". Adreso: Sofia 13, Bulv. Lenin 83/107-A, Bulgarujo.

Literaturo

● Eldonejo KoKo (adreso: Jyllinge-Roskilde, Danujo) reklamas siajn eldonaĵojn per senpaga "KoKo-Revuo".

● Ankaŭ ĉi-jare oni aljuĝos la premion "Comella-Bassols" (2000 pes., 400 st.) al la plej bona gaja rakonto en Esperanto. Limdato: 31 aŭgusto. Petu detalan regularon de s-ro Francesc Vilà, Laŭria 12-1a, Barcelona-10, Hispanujo.

● S-ro S. Aarse, Amsterdam, kompletigis tradukon de la 150 sonetoj de Shakespeare. La laboro daŭris dek jarojn.

Medicino

● Ankoraŭ unu faka revuo — "Vasútegész-séggy", organo de kuracistoj de la Hungaraj Ŝtatfervojoj — ekde januaro 1967 aldonas resumojn en Esperanto al ĉiuj artikoloj.

Radio

● La Papo, laŭ gazetaraj informoj, donis negativan decidon pri la petskribo favora al uzo de Esperanto en la Vatikana radio (vidu januaro, p. 9).

Radio-amatoroj

● Radio-stacion instalas kaj funkciigas ĉiusembe kaj ĉiudimanche en la vesperaj horoj laŭ GMT la Vroclava Esperanto-Klubo (voksigno SP-6-PAM), Wrocław-17, str. Dubois 3, Poŝtkesto 8, Pollando.

Stratoj

● Novajn Zamenhof-stratojn havas: Bielsko-Biala, Polujo (dato?); D-583-Schwelm, Germanujo (14 apr 67). Esperanto-stratojn inaŭguris: D-583-Schwelm, Germanujo (14 apr 67); D-64-Fulda, Germanujo (8 maj 67); D-6414-Hilders (12 maj); Verona, Italujo (4 jun 67). La inaŭguron en Verona, kun meso en Esperanto, ĉeestis la pola ambasadoro. Ĝardenplacon Esperanto havas nun Bielsko-Biala, Polujo (dato?).

Tekniko

● La landaj asocioj en Bulgarujo kaj Ĉeĥoslovakujo formis teknikistajn sekciojn. Internacia teknikista organizaĵo, fondita en Budapeŝto dum la UK, funkcias en la kadro de ISAE.

Turismo

● Okaze de la Jaro de Internacia Turismo, Pola Esperanto-Asocio (Okcidenta Regiono) eldonis detalan liston kun adresoj de ĉiuj Esperantaj kongresoj kaj turismaj aranĝoj okazontaj. Adreso: PEA, Wrocław-17, Dubois 3, Poŝtkesto 8.

NEKROLOGOJ

WILHELMUS BAATEN

La 26-an de marto en Utrecht forpasis s-ro W. Baaten, 82-jara, malnova membro de UEA kaj delegito de post 1936.

ALFREDO KLEIN (1900-1967)

Forpasis en Parizo s-ro Alfredo Klein, malnova membro kaj iama delegito de UEA. Naskita en Hungarujo, li aktivis en la naturamika movado en Aŭstrujo kaj poste fariĝis prezidanto de Urugvaja Esperanto-Societo.

HENK GOEMANS

La iama ambasadoro (1958-1963) de Nederlando al Maroko, s-ro Henk Goemans, mortis la 30-an de marto 1967 en Tanger. Li estis dumviva membro de UEA.

RUDOLF PAWLIK (1883-1967)

La 1-an de aprilo mortis s-ro R. Pawlik, vicdelegito en Knittelfeld, Aŭstrujo. Esperanton li lernis de Julio Baghy en siberia militkaptiteco (1915-20).

GEORGO DEŠKIN (1891-1967)

La 27-an de februaro forpasis apud Tambov', Soveta Unio, la poeto Georgo Deŝkin. Li lernis Esperanton en 1908, fondis societon kaj estis delegito de UEA en Vilno, Litovujo. Lia Esperanta liriko aperis en "Versaĵoj" (1912) kaj poste en "Elektitaj versaĵoj" (1957). Eldono de kompleta poemaro estas en preparo. Ruslingva poemaro aperis en 1917, kaj de 1922 ĝis 1927 li estis komitatano de la Tutruslanda Unuiĝo de Poetoj.

LA JUNA VIVO

Oficiala organo de

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando

FERIOJ EN 1967

FERIO KAJ LABORO

Tiun kombinon vi trovos en Loveĉ, Bulgarujo, kie okazos de 1 ĝis 25 aŭg. la Dua Internacia Esp. Laborbrigado. En la Unua Laborbrigado, en 1966, partoprenis 150 gejunuloj.

Dum 22 labortagoj oni konstruos vojon, po 7 horoj tage. Ĉiu juna esp-isto, pli aĝa ol 18 j., povas partopreni, sen kostoj por loĝado kaj por la vojaĝo en Bulgarujo.

Interesiĝantoj rapide skribu al B. Leonov, str. V. Kolarov 40, Sofio, kiu nome de BEJ organizas la brigadon.

FERIO KAJ TURISMO

En Bydgoszcz, de 20 ĝis 28 aŭg., la Internacia Turisma Kunveno okazos en la programo de "Juventur" kaj PEJ. Ĝus aperis bela broŝuro pri ĝi.

Seminario "Esperanto en Turismo" okazos en la kadro de la Kunveno, samtempe, samloke. Ĝi estos oficiala kontribuo de TEJO al la Jaro de Turismo 1967.

Nepre petu la broŝuron pri la aranĝoj ĉe "Juventur", Al. Róz 2, Warszawa 61.

FERIO KAJ MUELEJOJ

En LJV-novembro aperis alvoko por kursgvidantoj ĉe "La Muelejoj de Metilernantoj", volontulaj labortendaroj en Francujo. En marto JEFO organizis sukcesan seminarion en Grésillon por la kursgvidantoj. Oni studis referaĵojn, aŭskultis kaj diskutis prelegojn kaj ekzercis instrumentadojn.

La somera programo por 1967 antaŭvidas 4 du-semajnajn kursojn por volontuloj en Piot, dum julio, aŭg. kaj sept. Estas ankoraŭ kelkaj lokoj liberaj por instruantoj, amuzantoj kaj helpantoj. Adreso: red. LJV.

FERIO KAJ VI

Nepre partoprenu en iu somera aranĝo de Esp. Junularo. Relegu ankaŭ LJV dec. (Enkhuizen), apr. (Bydgoszcz), majo (Natanja; Praha-Turyň; kaj Funka: BANJO-tendaro).

ARGENTINA AGADO

Kvar membroj de ArgentEJO partoprenis internacian labortendaron de MAJNU (Movado Arg. Jun. por U.N.). Rezulte de kontaktoj tie faritaj, en pluraj lernejoj (i.a. por-instruistaj) okazos kursoj de Esp. Kelkaj ĵurnalistoj partoprenos en alia kurso en Rosario.

Argentinaj ĵurnaloj aperigis ĉ. 40 anoncojn kaj raportojn pri la unua kongreso de ArgentEJO en januaro. La kongreson partoprenis 25 gejunuloj el diversaj lokoj (aliĝis entute 66 personoj). Jen kelkaj decidoj: oni kongresos estonte kune kun Arg. Esp. Ligo; oni intensigos kontaktojn kun NEJOj (vidu la bonegan ekzemplon ĉe MAJNU !); la bulteno "Perspektivo" aperos dumonate.

Oni starigis serion de rekomendoj por kursgvidantoj, kaj akceptis la projekton "Programo Pasporto".



Parto de la ĉeestantaro al la unua kongreso de ArgentEJO ĉeestas la inaŭguron de strato Zamenhof en urbo Rio Ceballos. La kongreso akceptis plurajn gravajn decidojn por la estonta agado, interalie pri la Programo "Pasporto", nun jam oficialigita de TEJO.

JAPAN-KOREAJ KONTAKTOJ

Ĉirkaŭ 20 studentoj-esp-istoj el Tokio vizitis Korean Esp. Junularon dum febr. kaj marto, laŭ invito de T. Gim, prez. de KEJ. Estas la unua fojo, ke okazis tia kontakto inter la du TEJO-sekcioj.

MADAGASKARO

La unuan fojon en Madagaskaro okazis seminario por gvidantoj, je 28 jan. 1967. Ĉeestis 36 esperantistoj, membroj de Esp. Asocio de Madagaskaro, kaj JEOM. Prelegis dum tiuj du tagoj Eugène Raveloson pri la temo "La interna organizado de asocio".

LA LINGVA PROBLEMO EN INTERNACIAJ JUNULARAJ RILATOJ estas la titolo de nova raporto de la NEJO-komisiono de TEJO, en la angla kaj franca lingvoj. La raporto, stencilita, 32 paĝa, pritraktas metodon por esplori la lingvan problemon, kaj raportas pri lingvotesto, farita dum la 22-a IJK en Pécs. La raporto estas havebla ĉe red. LJV, prezo 2,- gld.

NATANJA, LA URBO DE LA 23-A IJK.

La honora komitato de la IJK inkluzivas: s-ro E. Eilat, alta protektanto, prezidanto de la Hebrea Universitato; Prof. Kurcvajl; D-ro Bar Menahem, aganta urbestro de Natanja; tri lernejestroj de mezlernejoj en Natanja (en du oni lernas E-on devige) kaj inĝ. M. Savir. (inf. LKK)

esperanto
junio 1967

ESPERANTO EN RADIO

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Largentier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por pliaj detaloj vidu la aprilan numeron.

RADIO ROMA. Vidu detalan programon en la maja numero.

BRITA RADIO (BBC). La venontaj elsendoj okazos la 26-an de majo kaj la 30-an de junio. La bulgara programo, dum kiu okazas la esperantlingva parolado, estas anoncanta dum majo per la jenaj ondlongoj: 41.32 m (7260 kcs), 24.92 m (12040 kcs), 19.49 m (15390 kcs), 16.79 m (17870 kcs).

RADIO BERN nun elsendas per la jenaj ondlongoj: 48.66 m (6165 kcs) kaj 31.46 m (9535 kcs) por la kvar elsendoj de la semajno; krome, speciale direktata al Afriko, la tagmeza programo estas dissendata ankaŭ per ondoj

19.60 m (15305 kcs), 13.94 m (21520 kcs) kaj la vespera programo per ondoj 25.25 m (11880 kcs), 19.60 m (15305 kcs).

RADIO BUDAPEST nun dissendas sian ĉiutagan programon per ondoj 240 m (1250 kcs), 48.10 m (6234 kcs), 42.25 m (7100 kcs), 41.55 m (7220 kcs), 30.51 m (9833 kcs), 25.19 m (11910 kcs), 19.79 m (15160 kcs).

Dimanĉe, kultura programo kun muziko; lunde, sportaj raportoj; ĵaŭde, leterkesto de Ludoviko Puszta; en la aliaj tagoj, hungarlandaj raportoj, literaturaj, historiaj, lingvistikaj prelegoj, aktualaj komentarioj; krome, ĉiun labortagon, pririgardo pri la ĉefaj politikaj eventoj kaj informoj pri diversaj novaĵoj de la Esperanto-vivo. Raportoj, kritikoj, sugestoj ĉiam estos bonvenaj ĉe Radio Budapeŝt, Esperanto-disendoj, Budapeŝt VIII, Hungarujo.

INTERNACIA EKZAMENA KOMISIONO

En la sesio, kies Skriba kaj Parola Partoj okazis en la kadro de la pasintjara U.K. en Budapeŝt, sukcesis unu kandidato, s-ro Pavel Rosa el Bratislava, per la noto, "bona". Tiu kandidato nun rajtas prezenti sian disertacion, de kies prijuĝiĝo dependos la fina rezulto de la ekzameno.

Pro manko de kandidatoj, la sesio de la Internaciaj Ekzamenoj anoncita por la Universala Kongreso en Tel Aviv nun ne okazos.

Sesio de la Internaciaj Ekzamenoj okazos en la kadro de la XIa Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, Würzburg, 27 dec 1967 ĝis 2 jan 1968. Detaloj kaj kandidatigo ĉe la Sekretario: J. C. Wells, 33 Rye Hill Park, London S.E.15, Anglujo. Limdato por kandi-

datiĝo: 25 sep 1967.

La postvenonta sesio okazos en Madrido en aŭgusto 1968 (limdato por kandidatigo: 1 majo 68).

CIFEROJ POR MEDITADO

El ĉiuj individuaj membroj de UEA en 1966: 14 % estis tute novaj membroj en 1966, sed 58 % aliĝis jam antaŭ 1960; 76 % estis viroj (kaj 24 % estis virinoj!); 4 % estis malpli ol 22-jaraj; 78 % loĝis en Eŭropo, 12 % en Ameriko, 5 % en Azio, 4 % en Oceanio kaj nur 1 % en Afriko. Fine: inter novaj membroj estas pli da virinoj (ĉ. 30 %), ol inter malnovaj (ĉ. 20 %). Ĉu konkludi, ke nuntempe pli da virinoj aliĝas al UEA, aŭ ke viroj estas pli fidelaj (membroj), ol virinoj?

oficiala informilo
n-ro 402, 1 maj 67

VIZITANTOJ AL LA C.O.

La C.O. volonte akceptas vizitantojn por montri al ili la propran domon de la Asocio kaj la funkciadon de la laboroj. Ili venu prefere inter la 13-a kaj 14-a horoj aŭ inter la 17-a kaj 18-a. Ili ne forgesu, ke la geoficistoj ĉiam havas multe da laboro, kaj ili do ne restu pli ol duonan horon, se ili ne havas iun specialan temon por pritrakti.

GRAVA ATENTIGO

Pluraj oficistoj de la Centra Oficejo forestos dum la fino de julio kaj unua duono de aŭgusto pro la Universala Kongreso kaj pro libertempoj. Pro tio bv. prefere ne skribi al la Centra Oficejo dum la menciita periodo.

NOVAJ DELEGITOJ

Aŭstralio

Perth. FD (Tekniko: riparo de parkregistriloj): John Richardson, teknikisto, 60 Strickland Road, Mount Pleasant.

Brazilo

Santos Dumont (Minas Gerais) 41 000. VD & FD (Muziko) & (Religio: spiritismo): Hermindo

Rotatori, profesoro-eksfervojisto, Rua Dr. Guilherme de Castro no. 1107; C.P. 76, tel. 335.

Ĉeĥoslovakujo

Levice (Slovensko) 14 000. D: Peter Holba, studento, str. "28.-oktobra" 27.

Francujo

F-14-Lisieux (Calvados) 25 000. D: Charles Leconte, komercisto, 41 Rue Pont-Mortain; tel. 62-13-43.

F-68-Thann (Haut-Rhin) 8 000. D & JD & FD (Turismo): Roland Kubler, oficisto, 20 rue du Ruisseau.

Germanujo

D-7140 Ludwigsburg (Württemberg) 78 000. D: Josef Czeika, dipl. elektro-teknikisto, Hindenburgstr. 106.

Jugoslavio

Zagreb. FD (Sporto): Ivo Rodjanec, komerca oficisto, Blato 197, Zagreb-27; tel. (oficejo): 571-182.

Kanado

Sherbrooke (Québec) 79 000. FD (Reklamo: radio-stacia): Trefflé Mercier, reklam-redaktoro, App. 5, 554 Vimy; tel. 569-9331 kaj 569-5002.

Trois-Rivières. JD: la D.

Winnipeg (Manitoba) 500 000. D: Kenneth Mc Ilwain, remburisto, 1640 Manitoba Ave., Winnipeg 14; tel. JU2-3474.

Kolombio

Bogotá. FD (Elektroniko): Gonzalo Ramírez-Almanza, inĝeniero elektronika, Apartado Nacional 2160, Bogotá 1, D.E.; tel. 48-30-70.

Kongo

Kinshasa. FD (Studentaj aferoj): Louis Toko, studento, c/o E.N.D.A., Dépêche spéciale, Binza-Ozone.

Meksiko

Monterrey (N.L.) 920 000. D & FD (Medicino: pediatrio) & (Radioamatorismo): Victor Manuel Gonzalez, kuracisto, Daniel Zambrano 2615, Lomas; tel. 6-28-60.

Nederlando

Assen (Drenthe) 30 000. D: Jan Boering, oficisto, Broeklaan 50.

Norg (Drenthe). D: J. van Selms, em. prof-ino, Donderseweg 6.

Soest (Utrecht) 32 500. D: Johanna Carolina van Tinteren, flegistino, Colenso 107; tel. 02955-4320.

Ter Apel (Groningen) 9 000. D: J. A. Tuinder, social-helpisto. Van Hulststraat 1; tel. (05995) 254. FD(Sociaj aferoj): la D.

Wormer (Noord Holland) 8 000. D & FD (Edukado): P. J. van Tol, instruisto, Haanstraat 34.

Nov-Zelando

Christchurch. FD (Filatelo): Clifford Harding Brown, oficisto, "Gibraltar", 7 Scarborough Road, Sumner 8; poŝtkesto 17-511; tel. SUM. 6558.

Dargaville. FD (Turismo): la D.

Henderson. VD & FD (Medicino: homeopatio) & (Medicino: naturkuracado) & (Sporto: atletismo): Walter J. McLintock, oficisto, 24 Harrington Road; tel. 1372-X.

Papakura 12 000. D & FD (Inĝenieraj aferoj): J. K. D. Baker, ŝtatoficisto, 49 East St.

Whangarei. FD (Religio: Oomoto): William H. King, pensiulo, 27 Norfolk Street; tel. 87-506.

Pollando

Jaworzno (woj. Kraków) 62 000. D: D-ro Franciszek Skalniak, juristo, Jaworzno-Szczakowa, Kościuszki 3; tel. Jaworzno 2 n-ro 124.

Svedujo

Handen (Södermanland) 20 000. D: Kerstin Rohdin, bibliotekistino, Idunv. 27; tel. 08/777 1895.

Skellefteå (Västerbotten) 61 000. D: Yngve Forslund, lokomotivisto, Hyttlidgatan 58b, Skellefteå 1; tel. 0910/ 16173.

Svislando

CH-1854 **Leysin-Village** (Vaud) 4-10 000. D & FD (Blindulaj aferoj) & (SOS-aŭto-servo) & (Turismo): Robert Frochaux, Chalet Rollier, de l'Entraide; tel. 025/6 21 23.

CH-2000 **Neuchâtel.** FD (Edukado: mastrumado): F-ino Lucette Rosselet, mastrum-instruistino, 16 Avenue du Premier Mars; tel. (038) 40571.

Usono

Philadelphia. JD: D-ro Humphrey Tonkin, docento, Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104; tel. (hejme) LO 3-1264; (oficejo) 594-7357.

San Diego. FD (Literaturo): Charles Mann, instruisto-verkisto, 1265 Archer Street, San Diego, Cal. 92109; tel. 488-8850.

NE PLU VALIDAS (EN JARLIBRO 1967)

Aŭstralio. Melbourne: FD (Framasonismo).

Aŭstrujo. Knittelfeld: VD.

Brazilo: Pôrto Alegre: FD (Muziko).

Britujo. Croydon: D. Nailsea: D. Oxford: FD (Instruado).

Ĉeĥoslovakio. Zamberk: D & 2FD.

Danujo. Viborg: D.

Francujo. Hyères: VD. Paris: FD (Fotografio). Vernet: D & FD.

Germanujo. München: VD.

Italujo. Milano: FD (Bankoj). Torino: FD (Elektrotekniko).

Nederlando. Amsterdam: FD (Komerco/Industrio). Oosterland: D. Rotterdam: FD (Polico). Utrecht: D. Waga: D.

Norvegujo. Skorovatn: D. Trondheim: FD (Rel.)

Nov-Zelando. Paeroa: D & FD. Wanganui: FD (Edukado) & (Geografio).

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1967

stato je la 30-a de aprilo 1967

Konkurso I

	Lando	kvoto	poentoj	%
1.	(2) Francujo	7752	6051	78,06
2.	(3) Nederlando	5975	4621	77,34
3.	(1) Britujo	6691	5054	75,53
4.	Finnlando	3160	2205	69,78
5.	(6) Hispanujo	3250	2190	67,38
6.	(5) Usono	4526	2825	62,42
7.	(8) Svedujo	7180	4300	59,89
8.	(9) Italujo	4220	2375	56,28
9.	(15) Belgujo	2055	1150	55,96
10.	(7) Danlando	3099	1700	54,86
11.	(10) Svislando	2459	1235	50,22
12.	(11) Japanujo	3965	1925	48,55
13.	(12) Brazilo	3856	1729	44,84
14.	(13) Germanujo	7221	3115	43,14
15.	(14) Jugoslavio	5375	1660	30,88

Konkurso II

1.	(3) Islando	250	220	88,—
2.	Aŭstrujo	1475	1200	81,36
3.	(1) Kanado	1124	905	80,52
4.	Aŭstralio	1475	1034	70,10
5.	Sudafriko	260	145	55,77
6.	Israelo	595	300	50,42
7.	(11) Argentino	905	440	48,62
8.	(7) Nov-Zelando	1481	690	46,59
9.	(8) Madagaskaro	250	102	40,80
10.	Norvegujo	1755	660	37,61
11.	(9) Grekujo	270	100	37,04

(Vidu la regulojn sur paĝo 33. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

Pollando. Chorzów: FD (Turismo). Gdynia: D & FD. Wrocław: FD (Okulistaj aferoj).
Svedujo. Malmö: FD (Ŝipkomerco).
Svisujo. Bern: FD (Virinaj aferoj). Frauenfeld: D & FD. Murzelen: D.

DUMVIVA MEMBRO-SUBTENANTO

Smith, prof. Norman R., Kumasi, Gano.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Lock, s-ro N., Hawkes Bay, Nov-Zelando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1967

239 Boffejon, s-ro Hector, 240 Geers, f-ino Blanche, 241 Harry, s-ro R. L., 242 Jaumotte, s-ro M., 243 Lecat, s-ino Rena, 244 Schumacher, s-ro Hubert, 245 Verstraten, s-ro Jules, Belgujo. 246 Barbosa, s-ro Ant. de Souza, Brazilo. 247 Beliard, s-ro Luc, 248 Guillot, s-ro Jean-Paul, Francujo. 249 Rousseau, s-ro Henri, Maŭritanio. 250 Sahatdjian, s-ro André, Francujo. 251 Happach, d-ro V., 252 Schumacher, f-ino Margarete, 253 Teltz, s-ro Fritz, 254 Wuenschel, s-ro H. P., Germanujo. 255 Viti, s-ro Giulio, Italujo. 256 Lowe, s-ro Eldred W., Usono.

DONACOJ POR GENERALA KASO (Gld.)

Britujo: Ovington, f-ino Lydia, 5,25. Francujo: Durand, f-ino A., 8,50; Durand, s-ro R., 7,50. Hispanujo: Purull Soro, s-ro David, 6,—; Rodeja, s-ro Antonio, 1,20. Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 100,— Svedujo: Carlén, s-ro Erik, 416,77; Olsson, s-ro Einar, 10,20.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO) (Gld.)

Nederlando: Steffering, f-ino W., 15,—.
 Sumo entute ricevita: 25 523,97 gld.
 Sumo elspezita: 25 851,54 gld.
 Saldo negativa: 327,57 gld.

FONDAJO CANUTO

Britujo: Lapenna, prof. Ivo: 4 MA; Rytjkov, s-ro N.: 4 MA. Nederlando: Moerbeek, s-ro R.: 4 MA.

DONACO POR INTERNACIA ARTA TEATRO

Britujo: Rytjkov, s-ro N., 30,— gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
 Direktorino, C.O.

ANONCETOJ

(Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.)

Ĉu vi estas preta korespondi en Esperanto kiel "onkl(in)o" kun alilanda infano? Skribu al: s-ro J. H. Sullivan, 3 Berwick Avenue, Urmston (Manchester), Britujo.

Infanaĵ desegnaĵoj. La infanoj el Junulara Kulturdomo en Gdańsk, Pollando, volas nepre ankoraŭ en tiu ĉi lerneja jaro interŝanĝi infandesegnaĵojn je ĉiu temo kun la tuta mondo. Skribu al M.D.K. Gdańsk-Wrzeszcz, str. Hanki Sawickiej, Pollando. Certa respondo.

Dekokjara fraŭlino deziras interŝanĝi poŝtkartojn. Vera Lúcia Borato, rua Costa Bastos 56, Guanabara, Brazilo.

Por sukcesi kaj feliĉadi jen via gvidilo: "Monoteismo kaj Pozitiva Moralo" de Emil Gasse. Mendu al UEA aŭ ceteraj Libroservoj. Gld. 4,20; st. 16,80 + 10 %.

LAVESPA, kiu estas mondmovado al invalidoj kaj handikapuloj, deziras kontakti geamikojn de tuta mondo. Skribu al s-ro Manuel M. Heidun, Vestergade 53, Strib. Danlando.

La Poŝtmark-kolektado daŭras. Propono: sendu poŝtfreŝajn seriojn de via lando. Tiaj ofte havas pli da valoro, al tio, kion vi mem pagis por ili. Sendu daŭre al Peter Zacho (por UEA), Åmosevej 5 A, Kopenhago Brh., Danlando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Grajnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Grajnoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

La eta princo, franca ĉefverko de Saint-Exupéry. Traduko de Pierre Delaire. 17 fr. fr.

aŭ 49 steloj, afrankite. Sendu mendojn kaj monon al S-ro Delaire, Esperanto-Oficejo, 9 Bis, Rue du Commandant-de-Poli, 45-Orléans, Francujo. Poŝta ĉek-konto Delaire 271-69 Orléans, Francujo.

L'Esperanto vivant, de Pierre Delaire, kompleta enciklopedia vivanta lernolibro por francilingvanoj, kondukas al serioza profunda ellerno. Gramatiko, rekta metodo kaj plej diversaj abundaj legaĵoj, ktp. 22 fr. fr. aŭ 64 steloj, afrankite. Sendu mendojn kaj monon al S-ro Delaire, Esperanto-Oficejo, 9 Bis, Rue du Commandant-de-Poli, 45-Orléans, Francujo. Poŝta ĉek-konto Delaire 271-69 Orléans, Francujo.

Belaj dufacaj esperantistaj ŝlosilringoj. N-ro 1: Zamenhof-portreto kaj la mondo, kolore. N-ro 2: la stelo-monero de 10 steloj, fote reproduktita. N-roj 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 10, 11, 12 : 10 diversaj bildoj pri Parizo kun esperantista surskribo dorsflanke. Prezo de 1 ekzemplero: 3,20 fr. fr. aŭ 9 steloj, afrankite. Minimuma mendo: 2 ekzempleroj. Ek de 5 ekzempleroj, rabato de 10 %. 12 ekzempleroj (la tuta kolekto aŭ 12 modeloj laŭ elekto): 24 fr. fr. aŭ 68 steloj, afrankite. Sendu la mendojn kaj la monon per int. poŝtmandato aŭ bankĉeko al S-ro Delaire, Esperanto-Oficejo, 9 Bis, Rue du Commandant-de-Poli, 45-Orléans, Francujo. Poŝta ĉek-konto Delaire 271-69 Orléans, Francujo.

Moderna esperantista leterpapero de bonega kvalito kun la surskribo "Esperanto, lingvo internacia" kaj verda stelo. 100 folioj kaj 100 luksaj kovertoj kun la samaj tekstoj kaj stelo: 22 fr. fr. aŭ 64 steloj, afrankite. Sendu mendojn kaj monon al S-ro Delaire, Esperanto-Oficejo, 9 Bis, Rue du Commandant-de-Poli, 45-Orléans, Francujo. Poŝta ĉek-konto Delaire 271-69 Orléans, Francujo.

EN LA CENTRA OFICEJO DE U.E.A.
estas loko por sperta

OFICIST(IN)O

por redaktado de la Jarlibro kaj aliaj
oficejaj laboroj.

Nepre bezonataj kvalitoj estas precizeco,
akurateco kaj lerta lingvouzo skribe kaj
parole. Agrabla, internacia labormedio.
Salajro laŭ kapabloj.

Leteroj kun ĉiuj informoj pri kvalifikoj
kaj antaŭaj laboroj al la direktorino de
la C.O. de U.E.A., F-ino M. H. Vermaas,
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2,
Nederlando.

BINDITA JARKOLEKTO

de la revuo "Esperanto", 1966:
204 + 44 paĝoj, 136 ilustraĵoj.

Bela volumo bindita en verda tolo kun ora
surpreso.

Por Membroj-Abonantoj 1966: 7,— gld.
Por aliaj mendantoj: 14,— gld.

MODERNA ARĤITEKTURO

(en ligo kun la Internacia Jaro de Turismo)
estas la temo de la ĉi-jara

FOTO-KONKURSO DE UEA

Premioj: 100,—; 70,—; 40,— gld.

Sendu viajn nigra-blankajn konkurso-fotojn
(min. formato 13 × 18 cm) al: 52a Universala
Kongreso de Esperanto, POB 1289, Tel Aviv,
por alveni antaŭ la 1-a de julio 1967.

NOVA ELDONO EN LA FAMA SERIO
ORIENTO-OKCIDENTO (N-RO 6)

REGO LEAR

Bind.
16,50 gld.

Broŝ.
14,— gld.



160
paĝoj
21 x
15 cm.

Unu el la plej grandaj kaj emociaj dramoj
de William Shakespeare, REGO LEAR nun
aperis en la definitiva traduko de

K. KALOCSAY,

memore al la 350-jara datreveno de la morto
de la aŭtoro. Brilkvalita teksto, bela bindo,
formato de "Naŭzo", "Kalevala" ktp.

Eldono de Universala Esperanto-Asocio

ANKAŬ VI ANO DE LA 52-a U.K.!

Multaj esperantistoj, kiuj kutimas sufiĉe
regule viziti la Universalajn Kongresojn, es-
primis sian bedaŭron pro neebleco partopreni
la 52an Universalan Kongreson de Esperanto
en Tel Aviv.

Aliflanke ili plene konscias pri la graveco
kaj signifo de Universala Kongreso por la
unua fojo en Okcidenta Azio, kaj pro tio ili
esprimis la deziron iamaniere kontribui al la
sukceso de tiu ĉi granda evento.

Por kontentigi tiujn dezirojn kaj doni al
ĉiuj esperantistoj — do ANKAŬ AL VI — la
eblecon partopreni, almenaŭ spirite, en la 52-a
Universala Kongreso de Esperanto, estas star-
igita, laŭ decido de la Estraro de U.E.A.,
speciala

SIMBOLA ALIĜO AL LA 52-A

Pere de via simbola aliĝo vi ricevos specialan
kongresan karton kaj la Kongresan Libron, kiu
donos al vi la eblecon esti informita, malgraŭ
la malproksimeco, pri la kongresaj eventoj.

Pere de via simbola aliĝo vi kontribuos al la
kongresaj financoj, kio signifas kontribuon al
la sukceso de la unua Universala Kongreso en
Okcidenta Azio.

Estu ankaŭ vi ano de la 52-a Universala Kon-
greso de Esperanto! Simbole aliĝu al la 52-a
Universala Kongreso de Esperanto!

Simbola aliĝkotizo estas 25,— gld. (100,— steloj).
La kotizo povas esti pagita al la Konstanta
Adreso de la Kongreso — Poŝtĉekkonto N.
62 73 37 aŭ Amsterdam-Rotterdam Bank, Rot-
terdam — aŭ al la konataj adresoj de ĉef-
delegitoj kaj perantoj.

NOVA DISKO !

Kantas:

Ramona van Dalsem

akompanas:

TOOS SCHOONMAN

La Feliĉo

kaj ses aliaj kantoj en esperanto

La plimulto de la tekstoj kaj melodioj estas verkitaj de la kantistino mem, kiu gajnis per tiuj ĉi kantoj **la unuan premion** en amatora konkurso en Nederlando.

Senriproĉa prononco
Klarega lingvo

Fleksebla, nerompebla, plasta materialo
Eldonis: U.E.A. Prezo: 2,50 gld., 10 steloj
Aldonu 10 % por sendkostoj

Mendu tuj ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando. Poŝtkonto 378964

300 jarojn antaŭ Kristo


stenografio ludis gravan rolon. Ksenofono aŭ Aristotelo, kiuj laŭ la plej novaj esploroj stenografiis la marmoran tabulon, uzis preslitere kurtigitan skribon. Kompreneble tio ne povis kontentigi la skribantojn.

Nun elvenis **unesteno** — **Universala Esperanta Stenografio**, moderna sistemo en moderna libro (294 paĝoj, formato 16 x 22 cm). Ĝi aperis sub la aŭspicioj de UEA kaj de EKI.

La lernolibro por instrui sin mem, ankaŭ elstara varbilo por la Internacia Lingvo, estos sendita al vi tuj post ricevo de via antaŭpago de 21 s. fr. (banko kaj poŝtkonto 80-799, Schweizerischer Bankverein, CH-8042 Zürich). Ĝi estas ankaŭ havebla de la libroservo de UEA.

Eldonejo Mondo, lernolibra fako, Rothstr. 7,
CH-8057 Zürich 6.

unesteno



nepraĵo por ĉiu



**JEN VERKO NECESA POR NIA
KONFUZA MONDO**

**DULINGVA LIBRO (HISPANE KAJ
ESPERANTE) HONORE AL U. N. -
ORGANIZO EN LA JARO DE
INTERNACIA KUNLABORO**

Enhavo universale valora: Interesega — Instrua — Eduka — Literatura — Agrabla — Poezia kaj tre ilustrita

Unuiĝintaj Nacioj — Homaj rajtoj — Zamenhof, Paca Apostolo — Esperanto kaj Unesko — Esperanto-kulturo — Esperanto-lernolibro (por Hispanlingvanoj) — Poezia antologio Hispana kaj Hispanamerika — kaj aliaj diversaj temoj tre interesaj

Bindita volumo (cm. 20 × 15) 376 paĝoj, presitaj sur bona papero, kaj ilustrita per 130 fotogravuroj

BONEGA LIBRO POR DONACO

Prezo: U\$S 4.00 afrankite

Mendoj al UEA, al diversaj libroservoj aŭ rekte al "LA BONA SEMISTO"

Casilla de Correo 863

MONTEVIDEO (Urugvajo)